


# Esperanto 274

## aktuell



41. Jahr (2022) №4 (274)

Informationen für Esperantofreunde in Deutschland und Österreich



Mortis Helmut Klünder. Interkultura Centro Herzberg: Duflanka Erasmus-projekto en kunligoj kun daŭripovaj efikoj. „Daŭripovo“ – temo de la 99-a Germana Esperanto-Kongreso en Oldenburg. Germana Esperanto-Kongreso: Über Braunschweig. ·kune· – revueto de Germana Esperanto-Junularo: Impresoj de la 29-a KEKSO en Oldenburg.

## Deutscher Esperanto-Bund e.V. Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B  
[www.esperanto.de/deb](http://www.esperanto.de/deb) (Netzpräsenz)  
**Bankkonto** (por membrokotizoj kaj donacoj) / **Bankverbindung** (für Mitgliedsbeiträge und Spenden): HELADEFIERB, Sparkasse Odenwaldkreis, DE 3250 8519 5200 4011 4571.  
Spenden und Mitgliedsbeiträge für den D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.  
**Oficejo / Geschäftsstelle: Esperanto-Laden**  
Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,  
Leitung: *Elke Mondorf*  
030 / 5106 2935, 0800 336 3636  
Fax: 030 / 4193 5413  
[gea.oficejo@esperanto.de](mailto:gea.oficejo@esperanto.de)  
**Membroprozorgado / Mitgliederbetreuung**  
DEB: 0800 - 3 36 36 36 - 21  
DEJ: 0800 - 3 36 36 36 - 22  
**Briefpost** senden Sie bitte, soweit keine andere Anschrift angegeben, an die Geschäftsstelle. Sie wird von dort elektronisch weitergeleitet. Die angegebenen **Telefon-Durchwahlen** sind nach der Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu wählen.  
**Estraro GEA / Vorstand DEB**  
**Netzpost** an / *remesaĝo* al [gea.fe@esperanto.de](mailto:gea.fe@esperanto.de)  
Jedes Vorstandsmitglied ist individuell erreichbar per E-Post-Adresse in der Form *vorname.name@esperanto.de*.  
**Prezidanto / Vorsitzender**  
**Ulrich Brandenburg**, Durchwahl: -5111  
[gea.prezidanto@esperanto.de](mailto:gea.prezidanto@esperanto.de)  
**Vicprezidanto / Stell. Vorsitzender**  
**Andreas Emmerich**, Durchwahl: -5112  
**Trezoristo / Kassenwart**  
**D-ro Matthias Hecking**, Durchwahl: -5113  
**Sekretario / Schriftführer**  
**Nils Brinkmann**, Durchwahl -5125  
**Administrado / Verwaltung**  
**Barbara Brandenburg**, Durchwahl -5125  
**Suborganizoj / Unterorganisationen**  
**Andreas Diemel**, Durchwahl: -5114  
**Informteknologioj / Informationstechnologie**  
**Franz Kruse**, Durchwahl: -5119  
**Meza generacio / Mittlere Generation**  
**Michaela Stegmaier**: Durchwahl: -5126  
**Jugendvertreter / Junulara reprezentanto**  
**Michael Vrazitulis**, Durchwahl: -5118  
**Germana Esperanto-Junularo / Deutsche Esperanto-Jugend**  
**Michael Vrazitulis**, Durchwahl: -5211  
[michael.vrazitulis@esperanto.de](mailto:michael.vrazitulis@esperanto.de)  
**Komisiitoj / Beauftragte**  
[esperanto.de/deb/beauftragte](mailto:esperanto.de/deb/beauftragte)  
**Gazetaraj kaj publikaj aferoj / Presse und Öffentlichkeitsarbeit**

**Louis von Wunsch-Rolshoven**,  
Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112  
[louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de](mailto:louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de)  
**Komisiito por retaj kunvenoj / Beauftragter für virtuelle Treffen Heinz-Wilhelm Sprick**,  
[gea.zoom@esperanto.de](mailto:gea.zoom@esperanto.de), tel. Durchwahl -5128  
**Komisiito por rondvojaĝoj / Rundreisen**,  
Durchwahl -5123  
**Uli Ender**, [uli.ender@esperanto.de](mailto:uli.ender@esperanto.de)  
**Informmaterialo / Informationsmaterial**  
Goar Engeländer, Durchwahl: -5127  
[goar.engelaender@esperanto.de](mailto:goar.engelaender@esperanto.de)  
**Medienecho**  
**Hermann Kroppenberg**, Durchwahl: -5121  
[medienecho@esperanto.de](mailto:medienecho@esperanto.de)  
**Libroservo / Bücherdienst**  
D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**,  
Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz,  
Durchwahl: -5122, [buchversand@esperanto.de](mailto:buchversand@esperanto.de), [www.esperanto.de/buchversand](mailto:www.esperanto.de/buchversand)  
**Komisiito Interreta Redaktado / Beauftragter Internetredaktion**  
**Thomas Bormann**, Durchwahl: -5117  
[thomas.bormann@esperanto.de](mailto:thomas.bormann@esperanto.de)  
**Vertreter des DEB in der EEU-**  
**Versammlung / Representanto de GEA en la**  
**assembleo de EEU:** Jean-Paul Kuhfahl  
Durchwahl: -5116  
[jean-paul.kuhfahl@esperanto.de](mailto:jean-paul.kuhfahl@esperanto.de)  
**Pliaj adresoj / Weitere Adresen**  
**Germana Esperanto-Junularo (GEJ) / Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)**  
Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,  
030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412  
[www.esperanto.de/gej](http://www.esperanto.de/gej) (Netzpräsenz)  
**Interkultura Centro Herzberg (ICH) / Bildungszentrum des D.E.B.**  
Komisiitoj/Beauftragte: **Zsófia Kóródy** (instruado), **Peter Zilvar** (klerigado kaj kulturo), Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, die Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521) 1363, Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax), [ich@esperanto.de](mailto:ich@esperanto.de), [www.esperanto.de/ich](http://www.esperanto.de/ich)  
**Germana Esperanto-Instituto / Deutsches Esperanto-Institut**  
Prof. D-ro/Dr. **Martin Haase**, Lehrstuhl für Romanische Sprachwissenschaft, Uni Bamberg, Durchwahlen: -431 (Tel), -432 (Fax), [martin.haase@esperanto.de](mailto:martin.haase@esperanto.de), [www.esperanto.de/dei](http://www.esperanto.de/dei)  
**Germana Esperanto-Biblioteko / Deutsche Esperanto-Bibliothek**  
p/a. **Karl Heinz Schaeffer**, Schulstr. 17, 73432 Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax) [bibliothek@esperanto-aalen.de](mailto:bibliothek@esperanto-aalen.de), [bibliothek-aalen@esperanto.de](mailto:bibliothek-aalen@esperanto.de) [www.esperanto.de/bibliothek](http://www.esperanto.de/bibliothek)  
**Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung**  
**Andreas Emmerich**, [estraro@fame-stiftung.de](mailto:estraro@fame-stiftung.de) (nur por FAME)  
**Stiftung Mondo**  
Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal, 030/6920 4846-1, [stiftungmondo@gmail.com](mailto:stiftungmondo@gmail.com),

Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart eG, BLZ 600 901 00.  
Spenden sind steuerlich abzugsfähig.  
**Aŭstria Esperanto-Federacio / Österreichischer Esperanto-Verband**  
[aef@esperanto.at](mailto:aef@esperanto.at), [www.esperanto.at](http://www.esperanto.at)  
**Esperantomuzeo Vieno / Esperantomuseum Wien**  
Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien, +43/1/53410-731, Postanschrift: Österreichische Nationalbibliothek, Josefsplatz 1, Postfach 25, 1015 Wien, [plansprachen@onb.ac.at](mailto:plansprachen@onb.ac.at), [www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm](http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm)  
**UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundesbeauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA Germanio / Deutschland**  
D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**, Adresen siehe mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst **Aŭstrio / Österreich**  
**Leopold Patek**, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg, Poŝtel. +43/66473611289, [aon.913548977@aon.at](mailto:aon.913548977@aon.at)  
**Esperanto aktuel**  
ISSN 0942-024 X  
**Eldonisto / Herausgeber**  
Deutscher Esperanto-Bund e.V., der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)  
**Redaktista teamo / Redaktion:**  
**Stano Marček** (Martin/Slovakio), **Yashovardhan Singh**, Im Johannistal 23, 42119 Wuppertal. Durchwahl: -54  
**Kunlaborantoj / feste Beiträger:**  
**Aŭstria Esperanto-Federacio**  
**Hermann Kroppenberg** (Medienecho), **Utho Maier** (Bibliotheken), **Peter Zilvar** (ICH)  
**Presejo / Druck:** Alfaprint, Martin, Slovakio  
*Esperanto aktuel* kun -kune- havas ses numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo (vidu maldekstre supre) por 19 € (de eksterlando: 25 €) jare.  
*Esperanto aktuel* mit -kune- erscheint sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der Mitgliederbetreuung (s.o.) Ausland: 19 € (Ausland: 25 €) jährlich; für ordentliche Mitglieder im Beitrag enthalten.  
**Anoncoj / Anzeigen:**  
Skribu al / Schreiben Sie an: [deb@esperanto.de](mailto:deb@esperanto.de)  
**Kontribuoj / Beiträge**  
Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato \*.doc a.s.) al [ea@esperanto.de](mailto:ea@esperanto.de), por n-ro 2022/5 ĝis la 15-a de septembro 2022. Paperaj kontribuoj nur esceptkaze, tiam al Yashovardhan Singh (vidu supre). Senden Sie Ihre Beiträge bitte (im Format \*.doc o.ä.) an [ea@esperanto.de](mailto:ea@esperanto.de), für Nr. 2022/5 bis zum 15. September 2022. Papierbeiträge nur im Ausnahmefall, dann an Yashovardhan Singh (s.o.).



## Karaj legantoj,

kiel mi skribis en la pasinta numero, la eldonritmo de nia revuo ne ĉiam kongruas kun la datoj de niaj kongresoj kaj aliaj eventoj. Tion ni devas akcepti. Raportojn pri la 99-a Germana Esperanto-Kongreso en Oldenburg komence de junio vi do trovos nur en la nuna eldono, pli ol du monatojn poste. Sed mi volas komenci kun alia, trista novaĵo: nur du semajnojn post la kongreso (en kiu li ankoraŭ partoprenis kaj prelegis) forpasis Helmut Klünder. Nekrologon vi trovos aliloke en ĉi tiu numero. Mi persone perdis amikon, kun kiu mi jam ludis en la sablokesto antaŭ 65 jaroj – neniu en la Esperanto-Movado (escepte mian fraton) mi konis pli longe. Ni komune travivis multegajn renkontiĝojn, bonajn kaj malbonajn tempojn. Ĉiuj sciis, ke la lastajn jarojn li havis sanecajn problemojn, sed lia subita morto surprizis nin. Ĝi denove montras kiel urĝa estas generacia ŝanĝo ankaŭ por GEA.

Pri la kongreso en Oldenburg: unue grandan dankon al la Loka Kongresa Komitato, kiu laboris efike kaj fidele ne nur por aranĝi ĉiujn lokajn aferojn, sed ankaŭ por alparoli kontribuantojn kaj kunmeti la programon – tiel varian kaj altkvalitan, ke ĝi preskaŭ kompareblas kun Universalaj Kongresoj. Apartan dankon ankaŭ al niaj kunorganizantoj kaj kontribuantoj el Nederlando. Kaj ne laste dankon al Eŭropa Unio pro la financa subteno, ricevita tra la Erasmus+-programo. Ĝi permesis al ni disponi iom pli malavare ol kutime. Nia Erasmus-projekto „Daŭripovo“ (kies ĉefa parto estis la kongreso) ankoraŭ ne estas finita. Ni ankoraŭ laboras por pretigi libron surbaze de la ricevitaj kontribuoj, kaj okazos konkluda kunveno kun Esperanto Nederland komence de oktobro en

Groningen. Estas do tro frue por glorigi nin mem. Sed certe la 99-a GEK tre bone preparis la 100-an venontjare en Braunschweig, por kiu ni povis ŝpari iom da mono kaj reteni la protagonistojn de la oldenburga LKK. Por la jubilea kongreso jam aŭdiĝis kelkaj ideoj. Kiel plej bone realigi la temon „Esperanto – amikoj tutmonde“? Kaj kiel certigi ke la kongreso trovos la atenton, kiun ĝi meritas?

Ĉi tiun leteron mi skribas revojaĝante de alia Esperanto-evento, la 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en Klaipeda (Litovio). La nombro montras, ke ankaŭ ili jam havas longan tradicion. BET originas en la sovetia tempo. Komence la T signifis tendaro, kaj kunvenis ĉefe studentoj loĝantaj en la tiamaj apudbaltaj respublikoj. Pri tio en Klaipeda rakontis la organizantino de la unua BET, Biruta Rozenfelde el Latvio. Kerno de BET daŭre estas esperantistoj el la tri nun sendependaj ŝtatoj. Al ili dum la lastaj jardekoj aldoniĝis multaj fideluloj el oriento kaj okcidento kaj unuafojaj vizitantoj, kiel ĉi-foje UEA-prezidanto Duncan Charters kaj mi mem. En Klaipeda ĉeestis pli ol 200 partoprenantoj. Impresis min la kvalito de la programo kun forta scienca kaj esperantologia elementoj dank’ al Amri Wandel kaj Ilona Koutny. Tre valoris ankaŭ la prelegserio pri historio, lingvo kaj kulturo de Litovio, la ekskursoj kaj la muzikaj vesperoj kun partopreno de Sepa kaj Asorti, Anjo Amika, Georgo Handzlik, Saša Pilipović, la ukrainanoj sub gvido de Miĥail Lineckij kaj Sergej „la terura“. Bedaŭrinda estis la foresto de Mikaelo Bronštejn. Al li okazis kiel al ĉiuj aliaj aliĝintoj el Rusio: pro la aktuala situacio (la „novaj kondiĉoj“, kiel oni ironie memorigis pri kanto populara inter sovetiaj esperantistoj) ili ne povis veni. La venontjara BET okazos post unu jaro en la Latvia havenurbo Ventspils (ankaŭ ĝi atingebla el Germanio per ŝipo). Mi rekomendas partoprenon. Por la ĉijara BET gratulon al Povilas Jegorovas kaj lia impresa nombro de helpant(in)oj, ĉiuj perfekte parolantaj nian lingvon.

Mi mem nun pretiĝas vojaĝi al Montrealo por partopreni en la Universalaj Kongreso, finfine denove ĉeesta. Somero ĉifoje do plena de esperantaĵoj. Mi raportos en la venonta letero.

Amikajn salutojn

Ulrich Brandenburg

## Enhavtabelo/Inhalt

**1:** Mortis Helmut Klünder.

**2:** Adresoj.

**3:** Germana Esperanto-Asocio: Karaj legantoj. Enhavtabelo.

**4-6:** Interkultura Centro Herzberg: Tre sukcesa duflanka Erasmus-projekto en kunligoj kun daŭripovaj efikoj. Prelego pri Esperanto dum sociolingvistika simpozio. Perrigarde esplori (rigardekzameni) homon por alproksimigi al si mondon. Senkosta loĝejo por helpantino kaj multaj Esperanto-servoj. Jahreshauptver-sammlung der Stiftung Esperanto-Stadt Herzberg im Herzberger Rathaus.

**7:** Nekrologo: Mortis Helmut Klünder.

**8:** Aalener Esperanto-Kulturpreis - FAME.

**9:** Renkontiĝoj: *Tempi passati* – aŭ ĉu eblas renesanco? Pluvivo kaj ekzistado de Printempa Semajno Internacia en danĝero.

**10-12:** Germana Esperanto-Kongreso: „Daŭripovo“ – temo de la 99-a Germana Esperanto-Kongreso en Oldenburg. Impresoj pri la Kongreso en Oldenburg. Germana Esperanto-Kongreso 2022. GEK – raporto pri la ekskurso al la marĉo de Goldenstedt.

**13-15:** Publika agado: Die Esperanto-Hasser. Vortrag "Esperanto und seine Zukunftschancen" am Matthes-Enderlein-Gymnasium in Zwönitz. EXPOLINGUA.

**16-18:** El la landaj kaj fakaj ligoj: Einladung zur gesonderten Landesversammlung des Esperanto – Landesverbandes – Rheinland-Pfalz. Intensa semajnfino por progresintoj en novembro. Eŭropa Tago 2022 en Guben/Gubin. Denove Ponta Festo en Frankfurt (Oder). 30-jara jubileo de la eldonejo KAVA-PECH.

**19-20:** Medienecho.

**21:** Kalendaro

**22-23:** Aŭstria Esperanto-Federacio: Buchrezension: Vinko Ošlak: *Die Bibel mit Esperanto – Esperanto mit der Bibel*. Rakonto pri vojaĝo tra la tempo.

**24:** Germana Esoeranto-Kongreso: Über Braunschweig. Pri Brunsvigo.

**25-31:** ~~kune~~ – revueto de Germana Esperanto-Junularo: Enkonduke.

Impresoj de la 29-a KEKSO en Oldenburg. Kie restas la vespero por Esperanto? Recepto por veganaj musliok-eksoj. Rakonto: La mallklara akvo.

**32:** Bibliaj tagoj – aliĝilo.

# Tre sukcesa duflanka Erasmus-projekto en kunligoj kun daŭripovaj efikoj

Tuj ĉe la fino de Pentekosto 2022 vizitis nin dum dek tagoj tridekpersona interkultura grupo el Nowy Sacz/PL.

**T**emis pri duflanka ERASMUS-projekto por la t.n. Tria Generacio, en la temosenco kiel atingi mensan kapablecon dum la tria periodo de la vivo per lernado de nova lingvo, jen Esperanto.

La granda nova Esperanto-grupo sub gvidado de Maria Baran, Bozena Kocyk kaj Jolanta Kieres tranoktis en du hoteloj de la apuda vilaĝo Herzberg-Sieber. La konata Esperanto-instruistino Zsofia Korody kun helpo de Andries Hovinga el Nederlando matene donis Esperanto-lecionojn.

Dumtage okazis ekskursoj, ekzemple al la historiaj urboj Duderstadt, Göttingen, Goslar, Osterode kaj Bad Lauterberg.

Gvidadoj fare de Peter Zilvar okazis ekzemple en la Esperanto-urbo Herzberg kaj la universitata urbo Göttingen kaj ĉe la norvegstila lignobastonpreĝejo en Hahnenklee (proksime al Goslar).

Praktikaj kaj sukcesaj kulturaj interagadoj okazis ekzemple kun la Blovorkestro Herzberg, kiu ludis alpkornojn kaj krome okazis inaŭguraj lecionoj rilate al praktikado de tamburado fare de la muzikinstruisto Matthias Müller. Ĉe la proksima bela Jues-lago okazis kune kun la kultur-grupo Futurateliero (Zukunftswerkstatt Herzberg) komuna kaj gaja globo-ludado. La nova Jues-helpasocio bakis multajn kukojn kaj tortojn por la Esperanto-geamikoj el Pollando kaj Herzberg kaj por la membroj de la Futurateliero.

Multaj homoj faris belajn grupfotojn. Ekzemple en la regiona gazeto *Harzkurier* aperis preskaŭ tutpaĝa resuma raporto pri la eksterordinara Esperanto-evento kun du fotoj.



Nia nova ĉefo de la Esperanto-urbo la urbestro Christopher Wagner afable akceptis la gastojn en la Kavalira Salono de la Welf-kastelo Herzberg. Tuj poste okazis inaŭguro de la nova elstara lignomonumento (Steleo). Tion kreis majstra lignoskulptisto el la pola urbo Nowy Sacz. La gravurita teksto emfazas la amikecon inter Germanio kaj Pollando danke al Esperanto. Krome nia urbestro Christopher Wagner ĉestis ĉe la inaŭguro de la nova dulingva informtabulo ĉe la impona citadela ruinejo Scharzfels (inter Bad Lauterberg kaj Herzberg).

Unu el la celoj de la Esperanto-Centro en Herzberg estas krei novan „Esperanto-Esplorpadon“. Jam ekzistas aliaj interesaj „Esperanto-haltstacioj“.

Cetere danke al la kelkjardekan aktivecoj de la Esperanto-Centro Herzberg ni troviĝas en ununura loko en la mondo, kie Esperanto jam estas „ankrumita“ en la administracia kaj reala vivosfero.

Se iu idealisto volas kunkreadi kaj helpi por la multaj Esperanto-kulturdefioj en la unika Esperanto-urbo Herzberg am Harz, bv. kontakti la Esperanto-Centron Herzberg (ICH). Multaj interesaj Esperanto-taskoj atendas vin kaj nin.

Bonvenon ĉe Germana Esperanto-Centro en la Esperanto-urbo Herzberg am Harz!



## Prelego pri Esperanto dum sociolingvistika simpozio

De la 13-a ĝis la 16-a de julio 2022 okazis ĉe la universitato Gent /BE la jam 24-a (mondfama) „Sociolingvistika Simpozio“.

**D**ank al la aktiva kaj renoma sociolingvisto kaj lingvisto profesoro Goro Christoph Kimura el Tokio (Japanio) la kompetenta komitato de la Sociolingvistika Simpozio aprobis la lingvosciencan prelegon kun la titolo "Esperanto between lingua franca and minority language – a sociolinguistic assessment". La publika fakprelego okazis la 14an de julio 2022 (17h). Post certa tempo haveblas la teksto.

Cetere prof-ro Goro Christoph Kimura verkis pluan fakeseon en la germana lingvo pri specialaj atingoj rilate Esperanto en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. Baldaŭ ĝi aperos en scienca libro ĉe la renoma libroeldonejo Vandenhoeck & Ruprecht en la universitata urbo Göttingen.

P.S. Ni tre dankas al profesororo Goro Christoph Kimura pro la longjara observado kaj esplorado de niaj multflankaj Esperanto-kulturaktivecoj en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo.

Nepre ni kore dankas ekzemple al la urboadministracio sub gvido de nia urbestro Christopher Wagner por la praktikaj la sukcesaj kulturlaboradoj. Nia eta teamo post kelkjardeka laborado atingis multe kun novaj bonŝancoj por Esperanto en nia urbo, resp. regiono. Idealismaj kunkreantoj por nia Esperanto-Centro estas bonvenaj.

Kore dankas kaj salutas la EGS-estraro (de la Esperanto-Centro), jam en la 46-a asocia jaro:

Peter Zilvar,  
Harald Mantz, Zsofia Korody, Matthias Reimann,  
Marika Frense, Michaela Stegmaier, Ursula Zilvar



## Perrigarde esplori (rigard-ekzamini) homon por alproksimigi al si mondon

La novan kajeron de la biografia almanako "Esperanto por mi" aperigis la eldonejo Horizonte (Japanio).

**Ĝ**ia redaktoro kaj eldonanto estas Hori Jasuo, honora membro de Universala Esperanto-Asocio. En tiu ĉi eldonaĵo estas publikigitaj mallongaj aŭtobiografiaj eseoj de konataj esperantistoj de la planedo. Mirinda projekto, simpla, komprenebla kaj necesa! La aŭtoroj de la eseoj rakontas al la legantoj, kiel okazis ilia unua renkonto kun la internacia lingvo kaj kiun lokon Esperanto okupas en iliaj vivo, profesia kaj socia agado. Estas rimarkinde, ke ĉiu paĝo de la libro estas ornamita per originala grafika portreto de la aŭtoro de la eseo, farita de pentristino-grafikistino kaj pedagogino Helga Plötner. Ŝi naskiĝis la 25-an de januaro 1945 en la urbo Gräfenhainichen (Saksio-Anhalto, Germanio), kie ŝi loĝas kaj laboras ĝis hodiaŭ. En la kvara

6. Anatolij I. IONESOV (Uzbekio)



la agado por pli bona mondo. Ĝi estis la unua ĉi-speca muzeo en Sovetunio kaj unika institucio en Esperantujo. Ĝi rapide akiris bonan reputacion kaj rekonon ankaŭ ekstermovade. Dum 2005-2014 mi estis elektita kiel ano de la konsulta komitato de la Internacia Reto de Muzeoj por Paco (INMP).

Danke al Esperanto, mi akiris multajn amikojn tra la mondo, malkovris diversajn landojn, popolojn kaj kulturojn; establis pontojn de kunlaboro kun alilandaj partneroj, inkluzivigis mian hejmurbon en la orbiton de civitana diplomatio...

Mi ĉiam opiniis, ke la plej bona kaj efika reklamo de Esperanto estas praktika aplikado de la lingvo diversterene, konkretaj soci-utilaj faroj de esperantistoj.

De kelkaj jaroj kunlabore kun mia frato mi verkas la libron "Kulturo nomata Esperanto: Pri la historio de la Esperantomovado en Centra Azio", kiu esperable aperos en 2022 por omagi la 135-jariĝon de Esperanto.



El miaj ĝisnunaj projektoj aparte notindas la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro fondita en 1986 dediĉe al la Internacia Jaro de Paco. Mia vizio estis krei la muzeon, kiu kuraĝigos vizitantojn partopreni en

eldono de la almanako *Esperanto por mi* aperas 16 konataj internacilingvaj kompetentuloj el Usono, Ĉinio, Suda Koreio, Vjetnamio, Germanio, Francio, Ĉeĥio, Bulgario, Svedio, Brazilo, Madagaskaro, DR Kongo kaj Uzbekio. Cetere, uzbekianoj fariĝis la unuaj esperantistoj el Centra Azio, prezentitaj sur la paĝoj de ĉi tiu eldonaĵo.

Notindas, ke jam kelkajn jarojn la germana artisto Helga Plötner „kun fido, espero kaj amo por la paco“ sindoneme kaj abnegacie laboras por tiu ĉi volontula arta projekto, malgraŭ tio, ke dum la lastaj jaroj ŝi estas "katenita" al rulseĝo. En la estonteco Helga planas donaci ĉiujn kreitajn de ŝi portretojn al la Internacia Esperanto-Muzeo (IEMW) ĉe la Aŭstria Nacia Biblioteko en Vieno. Jen kion la artistino skribas al samarkandanoj: „Mi estas rulseĝulino kun grado de handikapo III - 70%, mi bezonas konstantan prizorgon. Tion faras mia edzo Manfred Reyher, kvankam li jam havas 79 jarojn... Sed mi ĝojas, ke helpo de saĝtelefono mi povas komunikiĝi kun la tuta mondo... Mi povas imagi, kiel belaj estas via lando Uzbekio kaj la urbo Samarkando... Mi spektis bonegan filmon pri Samarkando en televido. Mi miris pri la nekredible belaj antikvaj konstruaĵoj! Kiel en fabelo, kiel en alia mondo! Siatempe Manfred laboris dum tri jaroj en Moskvo kaj multe vojaĝis ĉie en Sovetunio. Li ankaŭ vizitis Samarkandon. Vidi Samarkandon per miaj propraj okuloj ĉiam estis aspirata revo por mi kiel artistino. Nun, pro mia handikapo, ĉi tio estas nerealiĝinta revo. Bedaŭrinde, mi ne povas vojaĝi en elektra rulseĝo... Mi konfesas, ke krei portretojn estas granda laboro, longaj horoj, tagoj, semajnoj da sidado ĝis mi sukcesas ekkapti la okulrigardon, ekkoni la animon de homo kaj poste arte speguli (bildigi) ĉion ĉi sur tolo aŭ papero. Mi deziras al vi pacon, sanon kaj bonfarton!“.

Nuntempe Helga Plötner fervore (diligente) laboras je la portretoj por la kvina kajero de la internacia almanako *Esperanto por mi* – 5, kies apero planatas antaŭjarfine.

Anatolij Ionesov

## Senkosta loĝejo por helpantino kaj multaj Esperanto-servoj.

**La Esperanto-Centro en la Esperanto-urbo Herzberg am Harz devas plenumi multajn interesajn Esperanto-kulturtaskojn.**

**E**stas fruktodona kaj konstanta interlaborado kune kun Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. Estas bonŝanco konstante uzi Esperanton en normalaj ĉiutagaj situacioj.

Tiu subtenema virino, kiu volas honorofice helpi por certa tempo, aŭ eĉ daŭre, povas trovi etan, sed belan loĝejon (sen lukostoj) en nia apuda domo.

Ekzistas bela Esperanto-ĝardeno kun Esperanto-pavilono. Krome la uzado de Esperanto-Centro (ICH) kun grandega biblioteko kaj retservo estos je dispono. Nia bela urbeto troviĝas en centra parto de Germanio ĉe la sudrando de la belega Harz-montaro kun multaj interesaj vizitlokoj. Ekzistas bonaj trajn- kaj buskonektoj. La Esperanto-grupo ofertas principe dum la tuta jaro diversajn kulturprogramojn, klubeton, havas ofte gastojn, Esperanto-seminariojn, ktp. Okazos komunaj migradoj, bicikladoj, ekskursoj per aŭto, ekzemple ankaŭ al diversaj Esperanto-renkontiĝoj kaj informbudoj. Eble ankaŭ taŭgas por persono el eksterlando, kiu volas lerni la germanan pro profesiaj celoj. Ni povus oferti lingvokurson en la germana.

Tiu, kiu havas intereson, povas kontakti la Esperanto-Centron / ICH (Peter Zilvar) rete: [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

## Jahreshauptversammlung der Stiftung Esperanto-Stadt Herzberg im Herzberger Rathaus

**Die diesjährige Jahreshauptversammlung fand unter dem Vorsitz des Bürgermeisters bzw. Stellvertreters statt.**

**D**urch eine Zuspense konnten die Spareinlagen der Stiftung auf über 100.000 € erhöht werden. Einige Zuschüsse, z.B. für zweisprachige Beschilderungen und eine sog. Esperanto-Bank, wurden dankenswerterweise vom Vorstand der Stiftung bewilligt.

Gleichzeitig tagte unter dem Vorsitz von Andreas Emmerich das Kuratorium der Stiftung. Mehrere Vorstandsmitglieder wurden wieder gewählt. Da einige Kuratoriumsmitglieder der Stiftung Esperanto-Stadt Herzberg "verschollen" sind, haben sich dankenswerterweise zwei neue Kandidaten für einen Posten im Kuratorium der Stiftung bereit erklärt. Diese Esperanto-Stiftung unter der Federführung der Stadtverwaltung Herzberg am Harz wurde vor bereits elf Jahren gegründet.



## Mortis Helmut Klünder (1948-2022)

**L**a 16-an de junio en aĝo de preskaŭ 74 jaroj forpasis Helmut Klünder, matematikisto, iama prezidanto de Germana Esperanto-Junularo (1970-1974) kaj de Germana Esperanto-Asocio (1983-1989), kies honora membro li poste fariĝis.

Helmut estis denaska esperantisto kaj devenis el Esperanto-dinastio: jam lia avo eklernis la lingvon antaŭ la unua mondmilito. Per la partopreno en junularaj eventoj li enkreskis en la movadon kaj baldaŭ transprenis respondecon, foje en malfacilaj momentoj por la asocio. Karakterizaj por li estis neskuebla trankvilo, fortaj konvinkoj, sed ankaŭ grandanimeco. Post la frua morto de lia edzino Ella li kreis fondajon, per kiu li multe helpis al individuaj esperantistoj.

Kiel prezidanto de GEA li retiriĝis el la unua vico jam kiel 41-jarulo. Sed li restis aktiva, videbla kaj aŭdebla en la Esperanto-movado. Multaj el ni memoras lin kiel regulan partoprenanton de Universalaj Kongresoj (ĉe UEA li estis membro de Societo Zamenhof), naciaj kongresoj, renkontiĝoj kiel PSI – kiun li kunorganizis – kaj NoRo.

Du semajnojn antaŭ sia morto li ankoraŭ partoprenis en la 99-a Germana Esperanto-Kongreso, kie li prelegis pri la orientfrisaj insuloj.

Lia entombigo okazis la 23-an de junio kun partopreno de multaj el ni en lia hejmurbo Burgsteinfurt. Ni ŝuldas grandan dankon al Helmut. Niajn sincerajn kondolencojn al lia filino Laura kaj al Anna Dupechaud, kiu akompanis lin dum liaj lastaj vivojaroj.

**Ulrich Brandenburg**

**H**elmut Klünder, konata denaska esperantisto el Germanujo, forpasis en la mateno de la 16-a de junio 2022.

De la komenco de sia vivo li aperis en la Esperanta movado kaj forte kunlaboris por plifortigi kaj disvastigi Esperanton, speciale en Germanujo. Laste ankoraŭ li partoprenis en Germana Esperanto-Kongreso 2022. Li ĉiam aktivis, partoprenis multajn aranĝojn kaj multe formis per sia speciala karaktero kaj unikaj ideoj la Esperantan mondon. Li transprenis respondecon jam kiel adoleska homo en Germana Esperanto-Junularo kaj poste en Germana Esperanto-Asocio. Li kunfondis la aranĝon PSI (Printempa Semajno Internacia) kaj subtenis pere de la fondajo memore al sia edzino Elisabeth-Klünder-Fondajo multajn homojn kaj aranĝojn. Veras, ke li estis grava persono de kaj por Esperanto.

Helmut Klünder, ein bekannter Esperantist aus Deutschland, ist am Morgen des 16. Juni 2022 verstorben. Seit Beginn seines Lebens erschien er in der Esperanto-Bewegung und arbeitete sehr stark an der Verbreitung des Esperanto, besonders in Deutschland. Zuletzt nahm er am Deutschen Esperanto Kongress 2022 teil. Er war immer aktiv, nahm an vielen Esperanto Treffen teil und formte mit seinem speziellen Charakter und seinen eigenen Ideen die Esperanto-Welt ein Stück weit mit. Er übernahm als Jugendlicher bereits Verantwortung in der Deutschen Esperanto-Jugend und später auch im Deutschen Esperanto-Bund. Er ist einer der Mitbegründer des PSI (Internationale Frühlings-Woche) und unterstützte mit einer Stiftung zum Gedenken an seine Frau Elisabeth Klünder viele Menschen und Treffen. Es ist wirklich wahr zu sagen, dass er eine wichtige Person von und für Esperanto war.

**Julia Noé**



Fotoj: Brian Moon.

## Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen

# Aktuelles, Wissens- und Bedenkenswertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen

### Folge 66 – FAME 2022

„Alte Hasen“ unter deutschen Esperantofreunden – sicher, die gibt es, und was wäre unsere Movado ohne diese? „Alte Hüte“ gibt’s da ja auch – ein alter Hut ist etwas, das alle schon längst wissen; alte Hasen kennen das und können ein Lied davon singen. Doch genug der Wortspiele!

Dass es in der Esperantowelt nicht ohne eine neue und damit jüngere Generation weiter gehen wird, liegt wohl auf der Hand und darf dennoch nicht aus dem Blick gelassen werden.

Und wenn ich hier immer von Esperantofreunden schreibe und das auf Deutsch (und nicht einschränkend von Esperantisten oder Esperantosprechern), so geschieht das durchaus in dem Bewusstsein, dass uns gerade auch die Sympathisanten, die nicht (oder noch nicht oder noch nicht so gut) unsere Sprache beherrschen, wichtig und hilfreich sind.

Sei’s wie es wolle oder wie es eben ist! Im Herbst will die FAME allen pandemiebedingten Widrigkeiten zum Trotz endlich die Preisträger ihres Aalener Esperantokulturpreises auszeichnen. Die Organisation der Veranstaltung obliegt dem Kulturamt der Stadt, und das möchte die Teilnehmer schriftlich per Post einladen, um verlässlichere Anmeldezahlen zu haben.

Nun ist aber unsere Adressdatei von anno Tobak, und die längere Pause hat da auch nicht gut getan. Nicht nur die Reihen der FAME-Mitstreiter und -Zustifter lichten sich, auch die Anzahl sonstiger interessierter Esperantofreunde sinkt, unter anderem auch deshalb, weil man eben mit fortschreitendem Alter nicht mehr so mobil ist und reisen will.

Daher möchte ich nochmals eindringlich darum bitten: ernsthafte Interessenten sollten sich umgehend melden; das geht am einfachsten durch eine Mail an [Einladung-FAME@esperanto-aalen.de](mailto:Einladung-FAME@esperanto-aalen.de), die nur Name, Straße, PLZ und Ort, aber keinen weiteren Text enthalten muss! Danke an alle, die dies bereits taten! Das ist keine bindende Anmeldung, sondern nur ein Signal für Interesse – ob man dann kommen kann, wird sich später zeigen.

Ein paar Hinweise zum Veranstaltungsort: die Stadt ist noch die alte, mit Sitz unserer Deutschen Esperanto-Bibliothek. Die Preisverleihung wird jedoch nicht mehr im Rathaus stattfinden.

**KUBAA**  
KulturBahnhof  
Aalen

Anschrift KUBAA  
KulturBahnhof Aalen  
Georg-Elser-Platz 1  
73430 Aalen



Aus einer Brachfläche und Brandruine entstand in den letzten Jahren Aalens neues Stadtquartier Stadtoval. Besonders stolz ist man auf dessen Herzstück, den *Kulturbahnhof KUBAA*, der als ganz besonderer Ort für Veranstaltungen gilt, und sein Akronym KUBAA steht nicht bloß für die Herkunft (Kulturbahnhof in Aalen), sondern soll deutlich machen, worauf man sich freuen darf: auf das **Kreative, Unvergessliche, Besondere,**


**Außergewöhnliche und Atemberaubende** Veranstaltungen.

Wo also fast 100 Jahre Lokomotiven repariert wurden und gut 40 Jahre Industriegeschichte geschrieben wurde, wird dann am **22. Oktober 2022 um 18 Uhr der 17. Aalener Esperantokulturpreis verliehen.**

Mit ihm werden die FAME-Stiftung zur Förderung internationaler Verständigungsmittel und die Stadt Aalen das Werk der beiden Musiker Ĵomart und Nataša auszeichnen, und wir dürfen hoffen, dass Ĵomart seine Gitarre mitbringt und sie


uns dann auch etwas zu Gehör bringen werden.

Dass wir dort im KUBAA einen großen Saal haben werden, bestärkt mich in den



Bemühungen, auch genug Esperanto-Publikum nach Aalen zu locken. Denn in einem großen Saal dieses Industriebaus wirkt unsere kleine, aber feine Esperantoversammlung noch kleiner.

Andererseits müssen wir den enormen Vorteil sehen und betonen: gerade in der ungewissen Pandemiezeit, von der wir ja



noch nicht absehen können, wann sie vorbei sein wird, muss *keiner* unsere Veranstaltung deswegen meiden, weil man sich zu sehr auf die Pelle rückt. Man kann genügend Abstand halten und ist dennoch dabei, ohne besondere Gefährdung für eigene Gesundheit oder die anderer.

Also: kommt in Scharen!

*Utho Maier*



# Tempi passati – aŭ ĉu eblas renesanco?

Bone, mi konfesas, ke la afero ne kaŭzas sendormajn noktojn al mi. Sed tamen:

**N**i scias, ke UEA havas la sistemon de delegitoj. En mia junaĝo la presita jarlibro de UEA nomis ĉiujn delegitojn. Do oni facile povis trovi esperantiston ie en la mondo, skribi al li kaj peti helpon. En la leteron oni enmetis internacian respondkuponon. La delegito povis senprobleme sendi respondon al la demandinto.

Venis la modernaj tempoj. La intereso pri klubo vivo daŭre malgrandiĝas, indiferece, pri kia klubo temas, ĉu sporta, kartluda, teatra aŭ iu alia. Tiu evoluo ankaŭ trafis UEA. Hodiaŭ oni povas vivi Esperantan vivon sen esti membro de iu ajn asocio, klubo, grupo. Tiu stato alportas avantaĝojn kaj malavantaĝojn. Unu el la malavantaĝoj estas, ke fariĝis multe pli malfacile trovi aliajn esperantistojn. Saĝtelefonaj aplikajoj ja ekzistas, same fejsbukaj „amikaroj“. Bone kaj bele, sed ju pli da tiaj ekzistas, des pli mankas superrigardo, mankas informcentro.

Pro tio mi proponas, ke ni instalu „listo de partoprenintoj“-n (labortitolo). Mi proponas, ke GEA okaze de ĉiu arango demandu la partoprenintojn, ĉu ili konsentas, ke aperu informo pri ili sur subpaĝo de *esperanto.de*. La nomo, la retadreso, la loĝurbo, la aĝo kaj aliaj povus esti interesaj informoj. Memkompreneble konsentanta demandito mem decidus, al kiuj informoj li/ŝi/ri donas la publikig-permeson.

Per tia listo ni povus ekkonstrui sistemon, per kiu interesitoj povus denove facile trovi esperantistojn. GEA povus substreki, ke ĝi estas la centro de la Esperanta vivo en Germanujo.


## Teknika klarigo (Franz Kruse):

Se ni instalos tian liston, ĝi estos aparta kaj sendependa de la diversaj listoj de partoprenantoj de niaj renkontiĝoj. Homoj povos libervole kaj memstare enskribi sin en la liston per elektronika formularo, en kiu ili donas la detalojn pri si, kiujn ili permesas publikigi. Kaj ili povas per la sama formularo ĉiam ajn ŝanĝi siajn detalojn aŭ tute forigi sian enskribon.

## Peto al vi:

Por sondi vian opinion kaj vian principan pretecon aperi en tia listo ni petas vin sendi retroŝtan mesaĝon al *listo-de-partoprenintoj@esperanto.de*. Bonvolu indiki, kiujn detalojn pri vi pretus publikigi (nomo, retroŝta adreso, telefonnumero, urbo, poŝta adreso, ...)

Peter Weide



## Pluvivo kaj ekzistado de Printempa Semajno Internacia en danĝero

*Karaj gelegantoj, karaj partoprenantoj de PSI,*

la PSI-teamo *psi.esperanto.de/teamo* ŝrumpis/ŝrumpos kaj la nombroj de partoprenantoj stagnis, eĉ falis dum la lastaj jaroj.

La pluekzistado de la Paska familia renkontiĝo PSI estas en danĝero!

Trifoje ni ne povis okazigi realan renkontiĝon, ĉi-jare kaŭzita ĉefe de la mankantaj fruaj aliĝoj, kiel vi povis legi en la lasta numero de „*Esperanto-aktuell*“ (Nr.273, paĝo 14), kiu enhavas la resumon de la ĉi-jara virtuala PSIeto.

Vi certe demandas vin, kial la pluekzistado de PSI estas en danĝero?

**Jen respondoj:** kaj mankas sufiĉe fruaj aliĝoj (ĝis fino de januaro) kaj mankas membroj de la PSI-teamo: Helmut bedaŭrinde forpasis, Laŭra ne plu partoprenas kaj Stefan ĉesos sian kunlaboron post la PSI 2023.

Jam nun ni bezonas kunlaborantojn en la PSI-teamo, kiu povas ne nur kalkuli la kotizon, sed ankaŭ povas starigi/okazigi infanan programon (por la tuta semajno), ĝuste

varbi, allogi partoprenantojn, artistojn, E-instruistojn ktp., por ke la Printempa Semajno Internacia restu atraktiva, alloga renkontiĝo por familioj kun infanoj, paroĵ kaj unuopuloj kaj homoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto kaj volas ĝin lerni.

Mi certas, karaj gelegantoj, ke kelkaj el vi povas helpi doni ideojn por la pluekzistado de PSI.

Multan dankon.

**La malgranda PSI-teamo**

retpaĝo: <https://psi.esperanto.de/eo/2023/>  
retpoŝtadreso: [psi@esperanto.de](mailto:psi@esperanto.de)  
aliĝoj por Wittenberg 2023 eblas ĉe:  
<https://psi.esperanto.de/eo/2023/>

# „Daŭripovo“ – temo de la 99-a Germana Esperanto-Kongreso en Oldenburg (de la 3-a ĝis la 6-a de junio 2022)

**Ĉeestaj kongresoj kun la fizika partoprenebleco ja fariĝis nekutimaj en la lastaj jaroj. En Germanio estis la unua fojo depost 2019, ke ni povis kunveni normale.**

**T**iun ŝancon revidi unu la alian uzis preskaŭ 170 (inkluzive la paralelan junularan renkontiĝon KEKSO) partoprenantoj el 8 landoj dum la pentekostaj tagoj en la bela universitata urbo Oldenburg, proksime de Bremen en nordokcidenta Germanio. Aparte ĝojiga estis la aktiva partopreno de esperantistoj el la apuda Nederlando. Favoris nin agrabla printempa vetero, kaj la kongresejo – ĵus nove konstruita junulargastejo kun restoracio kaj loĝeblecoj por la plimulto de la kongresanoj – estis ideala: nur por la plej grandaj eventoj necesis krome lui salonon en apuda hotelo. Kiel kutime la kongreso ebligis statutajn kaj organizajn kunvenojn, ekskursojn kaj distrajn programerojn. Apartan atenton ĉifoje tamen ricevis la kongresa temo „Daŭripovo“, al kiu estis dediĉitaj entute 13 prelegoj kaj aliaj programeroj, kaj kies elekto sendube helpis akiri EU-subvencion de la germana Erasmus-agentejo. La kongreso en Oldenburg estis parto de german-nederlanda partnera projekto, al kiu ankaŭ apartenas preparkunveno, publikigo de la kontribuoj kaj konkluda kunveno ĉi-aŭtune en Nederlando.

Daŭripova evoluigo jam de kelkaj jaroj estas temo ankaŭ inter esperantistoj. En 2020 aperis „Gvidilo al la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo de Unuiĝintaj Nacioj“, redaktita de Humphrey Tonkin kaj Rakoen Maertens. La 17 Celoj de UN ne rekte mencias lingvajn demandojn, des malpli Esperanton. Sed realigo de la Celoj postulas solidaran mondan komunumon – kiu ne povas funkcii sen komunikado. Kaj por komunikado ni havas solvon. Aldoniĝas, ke inter esperantistoj la procentaĵo de ekologie konsciaj personoj estas verŝajne pli alta ol la mezumo. Tial la organizantoj sen tro da serĉado trovis fakulojn, kiuj povis el diversaj vidpunktoj kontribui al la temo: la UEA-prezidanto Duncan Charters (kiu bedaŭrinde povis nur rete partopreni) prelegis pri lingvo, komunikado kaj daŭripovo; Federico Gobbo pri daŭripova lingvopolitiko en la eŭropa kunteksto, Bert de Wit pri biodiverseco, Inge de Bruin-Kooij pri akvomastromado. Aliaj temoj estis daŭripova spacekspluatado, reaktivigo de lokaj fervojaj linioj, ekonomio de publika bono kaj pluraj aliaj. La kongresa ekskurso kondukis nin al kleriga centro en proksima marĉo, kie Manfred Westermayer klarigis la kontribuon de marĉoj al protekto de nia klimato.

Ne ĉefe al daŭripovo, sed al bona etoso kontribuis la vesperaj programeroj kun muziko de Ĵenja kaj Geomar, Ralph Glomp (en Esperanto kaj platdiĉa lingvoj), Kajto (en Esperanto kaj la frisa) kaj Feri Floro (en Esperanto kaj la hispana). Parto de la kongresa programo estis ankaŭ sekvebla rete, kion lerte kiel ĉiam organizis Heinz Sprick.

La samaj personoj, kiuj bonege organizis la kongreson surloke, estos ankaŭ je dispono por la venonta – la centa – Germana Esperanto-Kongreso en Braunschweig, loko de la unua Germana Kongreso en 1906. La kondiĉoj (junulargastejo en la urbocentro komplete je nia dispono) tie estos similaj, la etoso esperebla ankaŭ, la temo iom alia: „Amikoj tutmonde“. Kiel indas por jubilea kongreso, venontjare la lingvo kaj ĝia movado okupos pli centran lokon. Jam nun eblas aliĝi per la retpaĝo de GEA ([www.esperanto.de](http://www.esperanto.de)). Gastoj kiel ĉiam estas bonvenaj.

**Ulrich Bradenburg**

## Impresoj pri la Kongreso en Oldenburg

**Estis bela vetero kiam mi alvenis en vendredo al Oldenburg.**

**M**i jam en marto estis en la luksa nova junulargastejo, kie nun okazis la kongreso pri Daŭripovo dum Pentekosto. La akcepto estis tre bonkora. Mi revidis konatojn de la LKK kaj aliajn geesperantistojn. Pluraj nederlandanoj ĉeestis. Ne nur ĉar Oldenburg situas proksime de Nederlando, sed ankaŭ ĉar laŭ invito de GEA Esperanto Nederland kontribuis al la programo de la kongreso, kiun sponsoris Erasmus+-programo de Eŭropa Komunumo.

Ni preparolis kiel oni povus realigi la 17 celojn kiujn Unuiĝintaj Nacioj difinis rilate al „daŭripovo“ kaj kiel oni povus integrite fari tion. Ĉar la kerno de la koncepto de Brundtland estas, ke oni ne konsideru nur la konservadon de la medio, aŭ nur la ekonomian progreson, aŭ nur la forigon de socia malegaleco. Ne, necesas tuteca aliro al la problemoj. Kaj en tiu rilato necesas ankaŭ konsideri la kulturon, en kiu oni vivas.

Plejofte homoj komprenas sub „daŭripovo“, ke io povas ekzisti ĝiseterne, sed tio ne estis la ideo de la Brundtland-

komisiono. Brundtland volis transformi la socion. En la kongreso Duncan Charters, prezidanto de UEA, bone prilumis la rilatojn inter Esperanto kaj kultura diverseco en la mondo. Li faris tion per ZOOM pro kvarantenaj kialoj (KOVIMO). La aliaj salutvortoj kaj la prelego de Federico Gobbo pri daŭripova lingvopolitiko en Eŭropo estis malvirtualaj prezentoj en la hotela salono. La juna urbestro de Oldenburg ĉeestis kaj parolis pri la strebadoj de la urbo realigi la celojn de daŭripovo. Tre bone, ke Ulrich Brandenburg tradukis por ŝi la salutvortojn.

La programo de prelegoj, distraĵoj kaj ekskursoj estis ampleksa. Oni parolis pri plej diversaj aspektoj: pri akvomastrumado, biodiverseco, bitmono, frisaj insuloj, sed ankaŭ pri Asterikso, k.t.p. Dum la vesperoj partoprenis ankaŭ la gejunuloj, kiuj havis sian KEKSO-renkontiĝon apude.

La ekskursiva programo ankaŭ plaĉis al mi. Dum la enurba ekskurso dimanĉe mi ekhavis bonan impreson pri la historio de la urbo. La gvidantino kerne klarigis kaj Amri Wandel tradukis ŝiajn vortojn flue. Posttagmeze mi partoprenis la ekskurson al la marĉo de Goldenstedt. Tie la klarigoj estis ampleksaj, kelkfoje iom tro ampleksaj, tiel ke kelkaj partoprenantoj jam antaŭeniris la grupon. Sed la graveco de marĉoj por la fiksado de karbondioksido (klimatŝanĝiĝo) estis tute klara por ĉiuj. Ekpluvis en la posttagmezo, tiel ke kelkaj sufiĉe malsekiĝis, aŭ fuĝis pro atakoj de kuljoj.

Ĉar la tuta kongreso estas kunfinancita per mono el la Erasmus+-programo de EK, oni devos ankoraŭ produkti oficialan raporton por la eŭropa instanco kaj tiucele la grupo ankoraŭ fojon kunvenos en Nederlando en la fino de septembro.

Entute mi havis tre agrablajn impresojn pri la kongreso. Dankon al la LKK kaj la aliaj personoj kiuj helpis iamaniere, ĉu per prelego, kanto, ĉiĉeronado, instruado, k.t.p.!

Bert de Wit

## Germana Esperanto-Kongreso 2022

**Post dujara paŭzo denove eblis renkontiĝi fizike en Germana Esperanto-kongreso, do vid-al-vide interbabili, ĝui koncertojn aŭ promeni tra ĝusta urbo. La pasinta kongreso, kiu ja devis okazi virtuale, absolute ne estis fiasko, sed tamen ĵus tiu konata etoso mankis.**

**G** EK 2022 okazis per kunlaboro de Esperanto Nederland inter la 3-a kaj 6-a de junio en la nordgermana urbo Oldenburg. La ĉefa kongresejo, en kiu ankaŭ tranoktis multaj partoprenantoj, estis la tre nova kaj moderna junulargastejo Oldenburg. Partoprenis

170 personoj el Germanio, Nederlando, Pollando, Belgio, Danio, Norvegio, Italio kaj eĉ el Israelo kaj Usono. Do temis pri internacia kongreso denove. Speciale menciinda estas la partopreno de blindaj esperantistoj, al kiuj helpis pluraj aliaj partoprenintoj. Inter alie ankaŭ mi kuraĝis fari tiun respondecan laboron.

Denove ĉiujn ĉeestintojn atendis tre varia programo, ĉiĉero organizita de tre lerta LKK. Dankon al ili pro la senlaca kaj sukcesa laboro!

Mi ofte ne komprenis kion la poeto volis diri en siaj poemoj.

Tamen, ili sonis tiel bele kaj mi facile eklernis ilin.

Poste ni daŭrigis trinkadon de tiu „ŝljivovica“ kaj mia amiko malfermis al mi sekreton.

Li estis la viro de plej granda konfido kaj laboris pri sekretaj taskoj de naŭtikaj kompleksoj. Li estis kaptita tie dum jaroj kaj eliris nenien.

Laŭ lia peto kaj laŭ la peto de aliaj, li havis neniun kontakton kun iu ajn. Mi estis la unua, kiu venis labori ĉe li, pro mia kompetenco.

Li unue kontraŭis tiun ideon, sed poste li komprenis, ke mi ne estas minaco kaj li malfermis al mi tiun sekreton.

Li efektive laboris per iu aparato, kiun vi aŭ mi povus nomi ia tempomaŝino.

Tiu maŝino revenigas homojn tra la tempo, al loko, kiun la homo mem elektas. Tiam mi rimarkis, ke li tiumaniere ricevas ankaŭ tiun ĉi bonan brandon. Li diris al mi, ke li unu tagon resendos ankaŭ min tra la tempo, por ekkoni kion mi legis en miaj libroj, pri tiuj sovaĝaj triboj loĝantaj en rezervacioj kaj renkonti tiujn sovaĝulojn. Antaŭ mia unua fojo kaj foriro tra la tempo, mi estis tiel nervoza, mi ne povis dormi. Mi scivolis kiel Robinsono Kruso dormis antaŭ ol li forlasis la marbordon kaj iris en la nekonatan, aŭ la unua astronauto antaŭ sia unua vojaĝo. Mi eniris en tiun ĉi rondon de tiu maŝino, metis horloĝon sur mian manon kaj estis preta.

Ne daŭris longe kaj mi troviĝis meze de iu herbejo, ĉirkaŭita de arbaro. Mi memoras, ke mi havis tiel grandajn kapdolorojn kaj mi svenis pro doloro, kaj tiam mi vomis. Ĉu pro tia aero aŭ pro tiu tuta procedo, mi ne scias. Eble dum tiu procezo, tiu blato en mia kapo estis bruligita... Mia amiko diris, ke la plej granda obstaklo kiel traveturi tra la tempo estis kun la blato, kiu tiam ankoraŭ ne estis oficiale produktita. Li unue devis neŭtraligi ĝin. Do, mi estis sur tiu herbejo kaj unu viro alproksimiĝis al mi.

Li diris, ke li nomiĝas Milivoje (Mile). Li estis nekredibla viro. Mi devas diri al vi, ke mi neniam en mia vivo vidis tiel eksterordinaran viron, kvankam li estis vere malbela homo. Li havis sulkojn kaj havis harojn sub sia nazo, lipharojn kaj grizajn harojn. Ni, en nia mondo ne havas tion. Ĉe ni oni

scias, kie oni rajtas havi harojn kaj kie ne, nia vizaĝo estas streĉita kaj ĉio estas en sia loko. Sed liaj okuloj ridetis.

Tiam venis ankaŭ unu virino. Ŝi portis antaŭtukon ĉirkaŭ la talio, koltukon ligitan ĉirkaŭ la kapo kaj diris: „Diable Miloje, vidu tiun viron kiel li spektas nin.“ „Edzino kara, ne diru tion, sed iru fari vian laboron!“ Diris ŝia edzo.

„Mia filo, ĉu vi fartas bone?“ Demandis la viro min. Mi komencis iom post iom ricevi mian konscion kaj spektis tiujn homojn, ili spektis min kaj diris al mi: „Venu, levigu, ekmoviĝu...“ La virino prenis min je la brako, levis min kaj la viro frapetis min sur la ŝultron la tutan tempon. Mi tute ne sciis kion signifas por li tiu frapo sur la ŝultro. Mi pensis, ke tio estas unu maniero de saluto kaj mi faris ĉe li ankaŭ la samon. Ni promenis tra arbaro kaj li rakontis al mi, ke ĉio ĉi tie apartenas al li. Lia avo lasis kiel heredaĵon ĉion al li. Estis vere nekredible vidi tiun belan heredaĵon. Li tre amis ĉiujn arbojn en sia arbaro. Mi demandis lin, ĉu mi jam troviĝas en tiu ĉi rezervacio.

„Ne mia filo, ĉi tie ne ekzistas rezervacioj. Ĉi tio estas nia Serbio.“ „Ĉu ĝi estas balkana klano?“ – demandis mi.

„Tio estas granda lando kiu estas libera.“

„Ĉu mi rajtas paroli ĉi tie ĉion kion mi volas?“

„Jes, mia filo, parolu ĉion kion vi volas. Nur, ne juru, por ke la infanoj ne aŭdu tion.“

Mi eĉ ne sciis ĵuri. Mi aŭdis de mia amiko, kiam li estis ebria, paroli iujn strangajn vortojn, sed mi ne demandis lin pri la signifo.

Ni promenis longe kaj venis ĝis ligna barilo, kaj mi vidis kelkajn prunarbojn. Mi ĝojige diris: „Pruno!“

Mi memoras, ke pruno estis desegnita sur la botelo, el kiu ni, mia amiko kaj mi trinkis. Ĉi tie estis ankaŭ skribita la vorto „Pruno.“

La viro ridetis kaj demandis: „Ĉu vi scias, kio estas Pruno?“ Mi respondis: „Mi scias kio estas Ŝljivovica.“

„Ho, tio plaĉas al vi! Neniu povas rezisti nian prunan brandon.“

Io bolas en ni, io tranĉas al ni, io kuras ĉirkaŭ ni, mi timas kaj ne scias kion fari. La viro prenis unu bastonon kaj forpelis ĝin de ni.

Li diris, ke tiu ĉi estaĵo nomiĝas hundo. Mi multe timis de tiu ĉi hundo.

Ni eniris en la korton, kie troviĝis ankaŭ aliaj estaĵoj. Iuj strangaj bestoj, kiuj ne aspektis kiel tiu ĉi hundo. Ili ĉiuj havas plumojn sur si, marŝante kaj bekante tiun teron moviĝis ili malrapide. Oni diris al mi, ke tiuj ĉi bestoj nomiĝas kokidoj. Ili donas ovojn kaj viandon.

Mi nenion komprenis. Mi aŭdis ion muĝi iom pli, do mi demandis min, kio estas ĉi tio? „Tio estas bovino, mia filo. Venu kun ni...“

Ili kondukis min al la stalo. Homoj, kia odoro estas tio?

Kio estas nun? Kiel ĉi tio bone odoras? Ili diris al mi: „Ĉi tie fekas la bovino, nia filo.“ Sed por mi tio agrable odoris. La avino prenis unu bluan poton kun blankaj punktoj, malgrandan lignan seĝon kaj alproksimiĝis al la bovino. Ŝi faris ion strangan, tuŝante la bovinon sub la stomako. Venis blanka fluido, ŝi plenigis la bluan poton kun lakto kaj diris al mi: „Trinku.“



## Über Braunschweig

**Braunschweig ist die zweitgrößte Stadt in Niedersachsen und wird häufig unterschätzt, obwohl die Stadt aus touristischer Sicht sehr attraktiv ist. Schriftliche Belege existieren seit dem 8. Jahrhundert.**

**I**m Mittelalter war Braunschweig Mitglied der Hanse und spielte dort eine bedeutende Rolle. Seit dem Ende des 19. Jahrhunderts hat sich Braunschweig zunächst zu einer Industriestadt entwickelt, später gewannen dann Bildung und Wissenschaft größere Bedeutung.

Leider wurde die Altstadt im Zweiten Weltkrieg weitgehend zerstört; jedoch verbleiben herausragende Sehenswürdigkeiten, vor allem der Dom und die Burg Dankwarderode.

Die Traditionsinsel um den Dom St. Blasius umfasst vor allem den Burgplatz mit Braunschweigs Wahrzeichen, dem Braunschweiger Löwen, dessen Original sich seit 1989 zum Schutz vor schädlichen Umwelteinflüssen in der Burg Dankwarderode befindet. Der Braunschweiger Löwe entstand im 12. Jahrhundert und ist die erste profane freistehende Großplastik des Mittelalters nördlich der Alpen.

Um das Standbild gruppieren sich nach Burg und Dom das Braunschweigische Landesmuseum, das Huneborstelsche Haus und das Veltheimsche Haus. Südwestlich hinter dem Dom liegen die Stiftsherrenhäuser aus dem 15. Jahrhundert. Ähnliche „Inseln“ bilden der Altstadtmarkt mit dem Altstadtrathaus, Altstadtmarktbrunnen, Gewandhaus und Stechinelli-Haus und der in seiner Nähe befindliche Kohlmarkt mit ebenfalls zahlreichen bedeutenden Gebäuden aus verschiedenen Jahrhunderten.

Sehenswert sind mehrere Kirchen, vor allem St. Magni, St. Martini und St. Michaelis. *(wird fortgesetzt)*



Ho, sed ni, en mia lando, ne tuŝas unu la alian, ni ne brakumas kaj ne kisas unu la alian. Kiel mi povas nun preni tiel simple tiun nekonatan fluidon, kiun ŝi prenis el unu besto? Kiel mi povas trinki tion? Do, tio kontraŭas mian edukadon.

„Prenu tion kaj trinku, mia filo.“ – daŭrigis la avino. „Ne timu.“ „Ĉu tio estas brando?“ – demandis mi. „Ne, tio ne estas brando.“ – ridetis la avino. „Prenu kaj gustumu.“ Do, mi flaris ĝin kaj ĝi odoris milde. Por mi ĉiuj odoroj estis specialaj. Mi ankoraŭ neniam sentis tiun ĉi odoron. Kvazaŭ mia nazo frenezigiĝis. Mi gustumis tiun lakton, iom post iom... Mi demandis, ĉu mi ankoraŭ iomete ricevos. Ŝi diris: „Ne tiel rapide, via stomako devas al kutimiĝi al tio. Venu kun ni...“ Ili enkondukis min kaj mi lekis min rigardante

## Pri Brunsvigo

**Brunsvigo, ofte subtaksata, estas urbo en la germana federacia lando Malsupra Saksio, laŭ la grandeco la dua. La skribita historio de Brunsvigo komenciĝis en la 8-a jarcento.**

**E**n la mezepoko ĝi apartenis al unu el la plej gravaj urboj en la komerca ligo Hanso. Dum la lastaj pli ol cent jaroj Brunsvigo estis industria centro. Hodiaŭ la sciencoj kaj la edukado estas pli elstaraj.

Bedaŭrinde la historia urbocentro estis detruita dum la Dua Mondmilito; tamen restas gravaj vidindaĵoj, precipe la katedralo Sankta Blazio kaj la kastelo Dankwarderode.

La „tradici-insulo“ ĉirkaŭ la katedralo konsistas el la kastela placo kun la simbolo de Brunsvigo, tio estas la brunsviga Leono. La originala skulpturo el la 12-a jarcento troviĝas nun en la muzeo por protekti ĝin; sur la placo oni vidas kopion. La leono estas la unua grandskulpturo sen religia rilato norde de la Alpoj.

Ĉirkaŭ la Leono situas Landa Muzeo kaj pluraj domoj de gravaj familioj de la mezepoko, ekzemple de la familioj Huneborstel kaj Veltheim. Sudokcidente malantaŭ la katedralo troviĝas pliaj. Similaj „insuloj“ estas Malnova Foiro kun Malnova Urbodomo, kaj Brasika Foiro kun tre vidindaj konstruaĵoj.

Nepre vidindaj estas ankaŭ pluraj preĝejoj, precipe Sankta Magno, Sankta Martino kaj Sankta Mihaelo.

*(daŭrigota)* **Andreas Emmerich**



tiun bovinon. Ŝi ankaŭ rigardis min. Mi memoras ŝian muzelon, kiu estis tiel ronda kaj ĉiam malseka. Mi ĉiam volis tuŝi ĝin. Ĉe la porkido ankaŭ aspektas la muzelo tiel. Mi ankaŭ deziris tuŝi ĝin, sed mi ne faris tion.

Ni prenis lokon kaj sidiĝis ĉe la tablo kaj la dommastrino alportis por mi dolĉaĵon de prunoj. Ŝi diris: „Ĉar vi ŝatas prunojn, prenu tiun dolĉaĵon kaj gustumu.“ – Ho, ĉu mi sukcesos formanĝi tion?

*(daŭrigota)*

Rakonto de la serba ortodoksa Patro  
Otac Predrag Popovic.

Originala titolo: *Prica o putovanju kroz vreme.*  
**Tradukita de Franziska Dodik**



# Enkonduke

## Michael Vrazitulis

Saluton! Ĉi-foje en ·kune· vi trovos kelkajn impresetojn kaj unu pli vastan, tre districte skribitan raporton de la pasinta KEKSO en Oldenburg, kiu okazis paralele al GEK 2022.

**K**rome, vere freŝe esperantistiĝinta 18-jaraĝa samideano el Berlino, kiu baldaŭ ekloĝos en Ruando por studado, prezentas sian opinion pri la (manko de) potencialo de Esperanto en diversaj mondopartoj. Se vi malsatas kiel mi, kiam mi skribas ĝuste tiujn ĉi liniojn post finredaktado de ·kune·, konsideru refari hejme (GE) ne asekuras

vin pri akcidente kaŭzitaj fajroj!) la vere ne tro komplikan bakrecepton por veganaj muslio-keksoj, kiun vi trovos sur unu de la sekvaj paĝoj. Cetere, ĉar la lastaj du GEJ-eventoj, la 1-a GEJ-Semajnfino en Halbe kaj la 29-a KEKSO en Oldenburg, ricevis tiom da pozitiva resonanco, ni organizos pliajn tiajn du ĉi-aŭtune! La 2-a GEJ-Semajnfino en Braunschweig (16–18 septembro) kaj 30-an (jeĵ, jubileo!) KEKSO-n en Kirel, Sarlando (21–23 oktobro). Por ekscii, kun kiu alia landa sekcio de TEJO ni ĉi-foje kunorganizos KEKSO-n, bonvolu kontroli la pli detalajn informojn same donitajn en tiu ĉi eldono de ·kune·. Fine, sekvas fikcia rakonto, kiun (ehm, koincide) verkis mia paĉjo kaj kiun mi decidis traduki el la greka. Ĝi flanke tuŝas plurajn temojn laŭ mi gravajn ankaŭ por GEJ, kiel socie agema kaj lingvopolitika organizo. Ĝuu la legadon!

Via ·kune·-redakcio



La 29-a KEKSO en Oldenburg

# Impresoj de la 29-a KEKSO en Oldenburg

## Paula Weil

Mi tre ĝuis partopreni en KEKSO. Post multe da jaroj da vizitado de Esperanto-renkontiĝoj kun miaj gepatroj, ĝi estis la unua renkontiĝo, kiun mi partoprenis sola. Nun mi ankaŭ renkontis kelkajn homojn de retaj eventoj en la reala vivo, tre bona rekomenco de surlokaj renkontiĝoj kun multe da ĝojo.

## Meriko Seidel

- Ich kam, ich traf, ich lachte.
- Die Kekse waren gut: 5/5 Sterne!
- Es war alles in allem ein sehr interessantes Wochenende, welches ich nicht besser hätte verbringen können.

## Oda Holzknicht

Kun 0 € da vojaĝaj elspezoj al KEKSO en Oldenburg: La ŝoforo en la regiona trajno inter Bremeno kaj Oldenburg miris, kiam mi prezentis mian VGN-bileton (Verkehrsverbund Großraum Nürnberg) anstataŭ la atendata 9€-a bileto.

Mia normala busa jara karto, kun kiu mi kutime veturas inter lernejo kaj hejme, egalas al la 9€-aj biletoj tra Germanio. La longa vojaĝo de Bavario al KEKSO en Oldenburg iom pli valoris, ĉar samtempe ĝi estis la ŝanco ĉeesti ĉe la 99-a Germana Esperanto-Kongreso.

## Amélie Schultze

Mir hat das KEKSO in Oldenburg sehr gut gefallen. Man hat viele nette Leute kennen gelernt, mit denen man sich über Esperanto austauschen bzw. unterhalten konnte.

## Leonardo Popov

Komence de junio ĉi-jare mi iris al Oldenburg en la nord-okcidento de Germanio, por partopreni en KEKSO, organizita de la asocio de junaj esperantistoj en Germanio (GEJ). KEKSO estas unu el tiuj multaj etaj renkontiĝoj inter junaj esperantistoj kaj simple scivolemuloj, kun la celo renkonti aliajn parolantojn kaj malkovri la mondon de Esperanto. Dum tri tagoj mi partoprenis multajn agadojn, el kiuj kelkaj estis organizitaj kunlabore kun Germana Esperanto-Asocio (GEA). Nuntempe loĝante en Roterdamo en Nederlando, kie mi volontulas ĉe TEJO, mi prenis la trajnon por iri tien danke, interalie, al la 9-eŭro-bileto proponita de la germanaj fervojoj (perfekta por vojaĝi

kun malalta buĝeto kaj ekologie). Do mi alvenis vespere la 3-an de junio, kaj trovis ĉirkaŭ dudek aliajn gejunulojn en ĉambro, kiuj ĉiuj havis tri aferojn komunajn: Ili estis germanaj, komencantoj aŭ spertaj esperantistoj, kaj ĉiuj alportis kukojn.

Gravas precizigi, ke unu el la apartaĵoj de ĉi tiu evento kuŝas en sia nomo, KEKSO. La keksoj estis post Esperanto la ĉeftemo. La instrukcio estis do alporti kukojn por kunhavigi ilin kun teo vespere (kaj tre rapide ĉi tiu regulo estis forlasita kaj ni konsumis sukeron de la 8-a ĝis la 22-a dum tri tagoj).



Ni pasigis la vesperon ekkonante unu la alian, kaj mi havis la ŝancon ricevi la unuan gustumon de la germana kulturo. Post meritita dormo, ni vekiĝis je la 8-a horo de la sekva tago por matenmanĝi. Post la manĝeto formiĝis tri grupetoj. La unua provis ĝisdatigi malnovan tekston en Esperanto. Mi trovis ĝin interesa, sed komplika. La dua estis partoprenado en enkonduka lingvokurso, mi trovis ĝin simpla, sed ne tre interesa. La tria faris la elekton de aventuro kaj malkovro de la gastiganta urbo. La malfacileco-interesecco-proporcio ŝajnis al mi bona, do mi partoprenis ĉi tiun defion.



Oldenburg-en-Oldenburg, per sia plena kaj iom komika nomo, estas tre ĉarma universitata urbo en la koro de Malsupra Saksio. Havante la iom stereotipan bildon de la ĝermanaj urboj, konsistanta el grizaj konstruaĵoj kaj

atestitaj post 1945, mi estis agrable surprizita de la beleco de la loko kaj precipe de ĝia tute brika preĝejo, konstruita kiel en Tuluzo. Povas esti, ke ĉi tiu „ĝi memorigas min pri io hejma“-flanko ludis grandan rolon en mia pozitiva juĝo.

La fino de la posttagmezo estis dediĉita al la plej okul-frapa momento de la renkontiĝo. La kongreso de germanaj esperantistoj organizis muzikajn koncertojn en Esperanto. Mi aparte ĝojis esti malkovrinta Ralph Glomp kaj lian version de Dancing Queen de ABBA. La sekva grupo Kajto kantis mildan muzikon kun diversaj instrumentoj. Estis vere agrable aŭskulti.



La sekvan matenon, krea agado. Ni desegnis ilustraĵojn sur ĉemizoj. Bedaŭrinde, mi ne havis la ŝancon esprimi mian artan senton, do jen la foto de la plej bona ĉemizo kreita:



Poste ni partoprenis en prezentoj pri diversaj temoj, inkluzive de la volontula programo. Ĉi tio estas organizita en partnereco kun Erasmus+. Kun Andries kaj Francesco, mi prezentis mian volontulan sperton ene de EKC kaj TEJO. La publiko, konsistigita plejparte de homoj jam partoprenantaj en la projekto, estis konvinkita.

Vespere, kina agado. Ni spektis ĉiujn mallongajn filmojn, kiuj konkuris ĉe la Usona Bona Film-Festivalo, pri kiuj ni parolis en Esperanto-magazino antaŭ kelkaj monatoj. La granda diverseco en kvalito inter la filmoj estis iomete malkoncerta. En la daŭro de kvin minutoj, ni iris de grandiozaj pafoj en la orientafrika kamparo al animacio, farita kun Microsoft Paint. La sperto estis tamen agrabla kaj ni ĉiuj bone ridis. #ĈuViŜatusDanci?

La lasta kuko antaŭ la krizo de diabeto – kaj ni lastfoje kunigis niajn litojn (ege komforte). La sekvantan matenon ni diris niajn korŝirajn adiaŭojn. Mi preskaŭ detruis en la emocio lampon kun mia kapo, sen fari ĝin intence. Feliĉe, la germanoj faras tre solidajn meblojn.

Profitante denove la 9-eŭro-bileton, mi profitis la okazon fari malgrandan ĉirkaŭvojon survoje reen al Bremeno, la urbo de muzikaj bestoj. Mi estis tre impresita de kloaktruo, kiu produktas la sonon de azeno, kiam monero estas enmetita. Tiel finiĝis mia sperto ĉe KEKSO, sed mia melankolio iom trankviliĝis pro la memoro pri la koncerto de Ralph Glomp.



## Kie restas l'espero por Esperanto?

Frédéric Düe

Por Esperanto, spite al ĝia utileco, ŝajnas, ke ne estas sufiĉe da kialoj por la plejparto da homoj lerni ĝin. Samtempe la fakto, ke Esperanto neniam konvinkis la plejparton da homoj, estas plia kialo ne lerni ĝin. Kiel solvi tiun diablan cirkolon?

Ofte oni pensas, ke Eŭropo estas la sola loko, kie ajna planlingvo povus sukcesi, kvankam en Eŭropo la esperantistaro nur malmulte kreskas aŭ eĉ malkreskas. La plej granda UK estis antaŭ pli ol 30 jaroj, kaj ankaŭ la Eŭropa Unio ŝajne ne vere interesiĝas solvi siajn problemojn per Esperanto. Fakte Eŭropo ne havas tiom da problemoj, por ke Esperanto kiel solvo vere necesas. Malgraŭ la fakto, ke Esperanto ja helpus al lernantoj kaj faciligus ankaŭ internaciajn rilatojn, en Eŭropa Unio jam estas sistemoj kaj strukturoj, kiuj uzas la anglan dum edukado aŭ por internaciaj rilatoj, do estus granda peno ŝanĝi tion, kio pli malpli bone funkcias ekde longe. Pasinta estas la tempo, kiam Eŭropo kreis tiujn sistemojn kaj serĉis tian identecon, kian Esperanto signifas. La problemoj de hodiaŭ malsamas al tiuj de antaŭ 30 jaroj kaj por ili nun, kontraŭe al la frua tempo, Esperanto ne multe gravas kiel solvo. Verŝajne tre longe daŭros, ĝis Esperanto denove gravos, ne nur en Eŭropo, sed en la mondo, precipe sen nova plano.

Do la ebleco efektiviĝi Esperanton en la sistemoj de Eŭropo estas, pli-malpli, for. La malsukceso konvinki Eŭropan Union pri la utileco de Esperanto ankaŭ denove signifas, ke nun estas eĉ pli malfacile konvinki aliajn. Estas same en aliaj mondopartoj: Ankaŭ en la Amerikoj, Azio kaj Oceanio oni kreis la bazajn sistemojn sen Esperanto. Se estas unu loko, kie ankoraŭ estas situacio komparebla al tiu de la juna eŭropa Esperanto-movado, estas Afriko. Kutime oni neglektas tiun mondoparton, kiel oni neglektas la movadon de planlingvoj mem, sed Afriko rapide kreskas. Niĝerio baldaŭ havos unu el la plej grandaj loĝantaroj en la

mondo, Bocvano estas tiom demokratia kiel Belgio, Ruando rapide iĝas internacia lando, kaj ĉio estos eĉ pli forta, kiam la landoj sukcesos unuigi kiel en Eŭropo aŭ Usono kaj fortaj sistemoj estos kreitaj. Plie kaj plej grave: Afriko havas la plej grandan junularon en la mondo kaj Afriko estos la lasta mondoparto, kiu malkreskos pro malgranda idaro, konsekvence havas la plej longan tempon por uzi la avantaĝojn de tio. Laŭ mi, la plej granda ŝanco, kiu restas por planlingvoj, estas la afrika junularo.

Nu, sciante tion, kion fari? Persone mi tiom kredas je Afriko, ke mi decidis studi en Ruando, min okuponte pri planlingvoj. Verŝajne tia agado nur eblas al personoj kun granda libereco, sed eĉ tio, kia estas la pensado pri la Esperanto-movado, tre gravas, ĉar la opinioj ja influas agadon. En la pasinta eldonaĵo de *Esperanto aktuell* estis subtenpeto de kongolandaj esperantistoj: Mi ne volas vidi tion kiel subtenpeton el Kongolando al Esperantio, sed kiel egalan rilaton inter Esperantio, kiu havas la koncepton, kaj Kongolando, kie estas ties ŝanco por sukceso, ĉar ambaŭ flankoj ja tiom bezonas unu la alian. Tial mi volas anonci la Asocion Nova Familio (ANF) el Goma, Kongolando. Tiu asocio instruas Esperanton al infanoj kaj georfoj, zorgante pri ili. La Asocio celas ebligi al ili memstarecon per edukado, do ankaŭ provas pagi por ĝi. Nuntempe estas danĝera milito en Goma, kiu tre malfaciligas la situacion, sed restas forta la espero. Rete troveblas informoj pri la asocio ĉe la retpaĝo de Germana Esperanto-Asocio, krome aliloke ĉe Jutubo aŭ Fejsbuko. Dume memoru, ke same kiel ANF kaj Afriko bezonas nin, Esperanto bezonas ilin!



# Recepto por veganaj muslio-keksoj

Annika Förster

## Ingrediencoj:

- 200 g da faruno
- 50 g da sukero
- 1 kulereto da cinamo
- 75 ml da kolza oleo
- 1 kulereto da vanila sukero
- 100 ml da planta lakto
- 200 g da frukta muslio



Miksu la farunon, sukeron, cinamon kaj vanilan sukeron en bovlo. Aldonu la oleon kaj plantan lakton kaj laste la fruktan muslion. Miksu ĉion bone.

Metu por ĉiu kekso po 1 supkuleron da pasto sur la bakpledon. Baku je 175°C dum 15 – 20 minutoj. Ĝuu!

## Savu la datojn: Zwei weitere DEJ-Treffen im Herbst!

Michaela Stegmaier,  
Michael Vrazitulis

Im kommenden Herbst erwarten dich wieder zwei Esperanto-Treffen, die von der DEJ organisiert werden. Während das DEJ-Wochenende im September sich eher an aktive Mitglieder und diejenigen, die es werden möchten, richtet, ist das KEKSO im Oktober zusätzlich auch für absolute Esperanto-Neulinge (vielleicht Freund:innen von dir?) geeignet, denn dort wird wie immer auch ein Anfängersprachkurs angeboten. Zu beiden Treffen bist du natürlich herzlich eingeladen!

Da unser DEJ-Wochenende in Halbe im April sehr schön war, möchten wir dir dieses Jahr gern noch eine zweite Gelegenheit anbieten, zusammen mit uns kreativ zu werden! Dieses Mal treffen wir uns **vom 16. bis 18. September in Braunschweig**, also an dem Ort, wo nächstes Jahr über Pfingsten auch der 100. DEK stattfinden wird – so viel sei schon mal verraten. Tagsüber wird es

wieder einige Inputs zum Thema Teambuilding sowie workshopähnliche Arbeitsgrüppchen geben, abends dann Spiele. Außerdem wird eine Actionbound-Stadtrallye unser Programm bereichern. Gern sind wir für weitere Vorschläge von deiner Seite aus offen! Bring vielleicht ein Spiel mit oder lass dich überraschen, was die anderen dabei haben!

Und bei der Gelegenheit schon mal vorab ein weiteres Datum zum Freihalten: Das nächste KEKSO findet **vom 21. bis 23. Oktober in Kirkel (Saarland)** statt. Das beschauliche Städtchen liegt direkt an der Regiostrecke zwischen Kaiserslautern und Saarbrücken, kann also bequem mit dem Zug erreicht werden. Da es sich bei diesem KEKSO um eine Jubiläumsausgabe handelt (es ist das dreißigste!), haben wir uns etwas Besonderes überlegt: Diesmal wird das Treffen gemeinsam mit der Französischen Esperanto-Jugend (JEFO) veranstaltet! Wie schon erwähnt, wird es einen Sprachkurs für Anfänger:innen geben, parallel dazu aber auch diverses Workshop- und Freizeit-Programm für die weiter Fortgeschrittenen.

Mehr Infos zum nächsten DEJ-Wochenende und KEKSO findest du auf unserer Webseite [esperantojugend.de](http://esperantojugend.de) – dort sind auch die entsprechenden Anmeldeformulare verlinkt. Wir freuen uns auf dich!

## Rakonto (parto 1/2): La malklara akvo

Jorgos Vrazitulis

Tradukita el la greka  
kaj komentita de Michael Vrazitulis

*Jen mi prezentas al vi la unuan parton de rakonto, kiun antaŭ nelonge verkis mia paĉjo en la greka. Ankorauĉ cerbumante pri la restanta, per iaj materialoj pleniginda spaco en tiu ĉi eldono de ·kune·, mi spontanee ekhavis la ideon traduki ĝin al Esperanto. Ĝi estas iom pli longa, ol mi memoris ĝin – tion mi ankaŭ dolore mem sentis dum la tradukado, haha – sed ege indas la legado! Kvankam ĝi ne havas per si mem specife junularan temon, ĝi tuŝas multajn aspektojn, kiel elmigrado, (militaj) konfliktoj en socio, ekstremaj veterokazaĵoj ĝis naturkatastrofoj (hodiaŭ pli kaj pli pro klimatsanĝo) kaj ĉefe minoritatlingvaj rajtoj, kiuj ĉiuj ankaŭ por la pli vasta socia agado de GEJ kaj TEJO estas gravaj. Ĉu la rolbildoj portretitaj en tiu ĉi rakonto, precipe tiu de la virina protagonisto, kongruas kun la juste akirita imago de genra egaleco inter ni pli progresemaj junuloj, tion certe eblas pridubi. Tio tamen ŝuldiĝas ankaŭ al la historia epoko, en kiu la rakonto rolas. Por doni iom pli da kunteksto pri la vivcirkonstancoj de la juna Vangjo, kiun vi renkontos en la teksto: Temas pri junulino, kiu kreskas*



Tradicia ŝtona ponto en la arumana vilaĝo Vovusa (aŭ Băiasă) en nordokcidenta Grekio. Fonto: [upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/d/d2/Vovousa\\_Bridge.jpg](https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/d/d2/Vovousa_Bridge.jpg)

*en vilaĝo en norda Grekio, en la tempo antaŭ kaj dum la Dua Mondmilito, kiam la minoritatlingva popolgrupo de la arumanoj, al kiu ankaŭ ŝia familio apartenas, trovis sin disŝirita inter du kontraŭantaj naciismoj, tiu greka kaj tiu rumana. Notu, ke en la teksto mi uzas la esprimon „valaĥoj“ anstataŭ „arumanoj“, kvankam ĝi ne estas la science pli korekta. Mi faras tion por eviti konfuzon inter alikaze eble ne tute facile distingeblaj referencoj al „rumanaj“ kaj „arumanaj“ aferoj. Cetere, per „valaĥoj“ pli bone resp. pli ĝuste ankaŭ la greka eksonimo por la arumanoj, „vlaĥi“, kiun oni trovas en la originalo.*

La meteorologoj diris, ke tiuj ĉi estis la plej intensaj pluvoj de la lastaj kvardek jaroj en la regiono de Sauerland en Vestfalio. Ili ene de nur kelkaj horoj igis riveretojn kaj rojojn tiom ŝveliĝi, ke ili portis nekalkuleblajn damaĝojn al domoj kaj proprietaĵoj en la tuta ĉirkaŭaĵo. La periferia urbeto Plettenberg troviĝis en situacio de konstanta alarmo, ĉie aŭdeblis sirenoj de hastantaj policaŭtoj kaj pezaj kamionoj de la katastrofa servo, kiuj klopodis savi ĉion ankoraŭ saveblan de la manio de la furiozaj akvamasoj. La malkvietiĝo en la domo de Jannis Mesjos tiutage estis eĉ pli granda, ekde kiam li ricevis telefon Alvokon frue matene de la pensiulejo, kie loĝadis malsana, kun progresinta formo de demenco, lia patrino Vangjo. Oni informis lin, ke jam de la elkrepuskiĝo ŝi estas malaperinta, kaj ke oni daŭre serĉadas ŝin ĉie, sed vane. Tiu novaĵo kostis al li preskaŭ tutan pakon da cigaredoj, kune kun neeltenebla ŝarĝo da kulposentoj, ĉar ja estis li, kiu estis konvinkinta sian patrinon kun, konfese, peza koro ĵus unu jaron, post kiam oni sendis ŝin al li de Grekio sekve de la morto de lia patro, ke estus plej bone por ĉiuj, se ŝi ekloĝus en jena „Altenheim“, kie ŝi ricevis perfektan prizorgadon. Pasiginte kelkajn horojn tien-reen-irante inter la salono kaj la kuirejo kiel lupoj enkaĝigita, li eksentis trankviliĝon,

kiam li aŭdis la sonorilon kaj, malferminte la enirejan pordon, vidis du junajn policanojn antaŭ si, kiuj apoge tenis lian patrinon ĉe la brakoj. Ŝia kondiĉo estis kompatinda. Ŝia blanka hararo aspektis krude kaj senorde, dum sub akrila kovrilo, kiun oni ĉirkaŭmetis al ŝi, por ke ŝi ne frostu, ŝi portis sole sian trempitan noktoĉemizon kaj pantoflojn. „Ni trovis ŝin en la parko“, diris al li unu el la policanoj. „Ŝi estis pasinta trans la malpermesajn barojn, starigitajn de ni pro la inundoj en la ĉirkaŭaĵo. Ŝi staris tute meze sur la fera piedira ponto super la rivero kaj aŭdeble monologadis. Ni havis malfacilaĵojn interkompreniĝi kun ŝi. La kuracisto de la ambulanco, kiun ni alvokis, ekzamenis ŝin tuj surloke, ne trovis ion ajn patologian kaj rekomendis al ni, ke plej bone ni unue portu ŝin al vi.“

Jannis dankis al la reprezentantoj de la ordaj instancoj, fermis kun unu „auf Wiedersehen“ la pordon kaj gvidis sian patrinon al la ĉambro, kie li jam estis gastiginta ŝin dum la antaŭa tempo. Li ŝanĝis al ŝi la trempitajn vestaĵojn sen povi dume eviti la malallogan vidon de ŝia skeletiĝinta kaj plensulkigita korpo, kiu portis preskaŭ unu jarcenton da vivo sur si, vestis ŝin per freŝa robo, kiun li trovis en la ŝranko, kaj envolvis ŝin sur la lito per peza kovrilo. Por iom li tenere karesis ŝian vangon, dum ŝi la tutan tempon rigardis lin per malplena fiksa rigardo, kvazaŭ ŝi vivus ie aliloke. Kiam li ekmoviĝis por eliri la ĉambron, li aŭdis ŝin balbuti, „Lu vātāmarā ... Lu vātāmarā ...“<sup>1</sup>, kaj tiam li ekkonsciis, ke jam de monatoj, ekde la lasta pliserioziĝo de ŝia malsaneco, la patrino ĉesis plu paroli greke, kvazaŭ iu estus preminta butonon por forigi la korespondan lingvan centron el ŝia cerbo.

Post iom da tempo sonoris la telefono. Je la alia flanko de la konekto estis lia onklo Viktoras el Grekio, senteble maltrankvila pro sia informiĝo pri la zorgigaj novaĵoj, kiuj koncernis lian fratinton. Jannis trankviligis lin, menciante la, feliĉe, bonŝancan finon de tiu neantaŭvidita okazaĵo.

Ili interŝanĝis kelkajn vortojn pri sano kaj maljunaĝo, kaj sekve Jannis aŭskultis la onklon diri al li, per peza suspiro, „Do kion fari! Jen la tero, sur kiu ni marŝas ... O, laia Vangjo ...“<sup>2</sup>

\* \* \* \* \*

Vangjo estis la unua de la kvin gefiloj de Jannis Rusas kaj ties edzino Marica. La naturo ŝin estis dotinta per fiera figuro, densa bukla kaŝtanbruna hararo, kiun ŝi kutimis plekti je du longaj dikaj ligajoj surflanken, densaj kurbitaj palpebroharetoj kaj brile plenbluaj okuloj. Spite al la malfacilaĵoj de la epoko, ŝi estis fininta kun sukceso la elementan lernejon kaj fakte dum du klasjaroj partoprenintis ankaŭ en alia lernejo, fondita de la rumana ŝtato, kiu en ŝia vilaĝo de multaj jaroj funkciis paralele al tiu greka. Por pli da literoj Vangjo ne estis destinita, ĉar jam de infanaĝo ŝi devis helpi, kiel ĉiuj aliaj knabinoj, pri la domlaboroj, pri flegado de bestoj kaj pri ĉio alia, kion la dura montara vivo postulis.

Verŝajne ŝi estis ĵus dek-ses-jaraĝa, kiam la milito,

1) arumane: „Ili mortigis lin ... Ili mortigis lin ...“

2) arumane: „Ho, kompatinda Vangjo ...“

kiu jetis la tutan homaron en ĥaoson kaj malesperon, fine ankaŭ alvenis al ŝia regiono. Ŝia vilaĝo, kiu troviĝis enŝovita kaj soleca meze de kanjonoj de la montaro de Pindo, tiutempe havis ĉirkaŭ kvincent animojn, valaĥojn montloĝemajn, ĉefe arbohakistojn kaj terposedantojn. Ili loĝis en du najbaraĵoj, kiujn en la mezo dividis rivero kaj kunligis malnova akroforma ŝtonponto. La rivero estis fonto de vivo kaj energio por la enloĝantoj kaj la tuta ĉirkaŭa regiono, sed kelkfoje, do kiam okazis pluvo senĉesa dum pluraj tagoj, aŭ kiam printempe fandis la glacio sur la ĉirkaŭaj montoj, ĝi transformiĝis en furiozan bestaĉon, kiu kun teruriga muĝado ĉion ajn forbalais dum sia malsuprenveno.

Ĝuste tia tago estis, pli-malpli fine de novembro, en la jaro, kiam la italoj de Mussolini entreprenis malhonori la landon, kiam la patrino de Vangjo, skuita de nervozo, vekis ŝin dum sovaĝe frua mateno kaj ordonis al ŝi kunpreni etan pakajon da manĝaĵoj – du pecojn da kuko, unu cepon kaj unu sovaĝpomon – por lasi ĝin en la garbejo de Lala-Tuŝjos, en la transa najbaraĵo, tuj preter la lasta domo ĉe la suprenirvoĵeto, kiu kondukas al Ioanino. Ŝi devus iri, ŝi devus lasi ĝin antaŭ la pordo kaj poste tuj reveni, nepre sen diri vorton al ajna homo, kiun ŝi renkontus surstrate. Antaŭ ol ŝi havis eĉ la ŝancon demandi pri kialoj kaj kieloj, ŝia patrino kliniĝis kaj per mallaŭta voĉo alparolis ŝin: „Ĝi estas por Zaros.“ Je la ekaŭdo de tiu nomo, Vangjo subite ekmoviĝis kaj ŝia vizaĝo lumiĝis dum momento. Stranga sento, kvazaŭ formika tintado, komencis leviĝi ene de ŝi, de la ventro ĝis la brusto, kaj sekve estis kovrita de emocio de timo kaj samtempa allogo, pri io malpermesata kaj danĝera.

La timo ŝuldiĝis ĉefe al la du ĝendarmoj, kiuj jam de jaroj estis instalitaj en la vilaĝo, du uloj tre minacemaj kaj severaj, kiuj facile ekscitiĝis, ĉu ili traktis junajn, ĉu maljunajn leĝorompintojn, precipe en tiuj fruaj tagoj de la milito. Pro tiuj du, Vangjo ekde sia infanaĝo kutimis tremi, ŝi aŭdis ilin, kiam ajn ili abrupte-malĝentile parolis kun la vilaĝanoj, aŭ vidis ilin, kiam ili faris aŭ diradis malbelaĵojn dum ebruiĝo ĉe diversaj festoj. Fakte ne el ili, la ĉefserĝento, alta, melhelhaŭta kretano kun torditaj lipharoj, estis deklarinta plurfoje per ruzaj rigardoj aŭ diversaj mokadoj siajn sekretajn dezirojn pri la tenera Vangjo.

Pasintaj estis proksimume du semajnoj de post la dura batalo de la greka armeo kun la italoj, kiuj estis alvenintaj ĝis tuj ekster la vilaĝo dum sia invado de la lando, kiam la du ĝendarmoj, kune kun malgranda taĉmento de pliaj ŝtadungitoj, kiuj estis senditaj de Ioanino, arigis en la vilaĝa centro ĉiujn homojn, kiuj estis priskribitaj en iliaj protokoloj kiel „rumanemuloj“. Simplaj homoj de la sama klopodlaboro kaj malriĉeco kiel la ceteraj vilaĝanoj estis ankaŭ ili, krom du-tri personoj, kiuj havis rektajn rilatojn kun la rumana konsulejo kaj administris la monon destinitan por la salajroj de instruistoj kaj la funkciado de la rumana lernejo. Ĉu pro neceso, ĉu pro familia tradicio, la plej multaj tiutempe trovis sin enplektitaj, plejparte pro la elekto de lernejo, kun la rumana flanko (aŭ „propagando“, kiel la alia flanko nomis ĝin). Tiun tagon ili estis arestitaj same kiel aliaj, kiel ili poste eksciis, el aliaj valahaj vilaĝoj,

kiel personoj de „dubinda aŭ malpliigita nacia spirito“ kaj eblaj kunlaborantoj de la malamiko, kvankam pluraj el ili ankoraŭ havis sur si la pulvon de la bataloj kontraŭ la turkoj en Eski Ŝehir kaj Sakarya.

Jena tago profunde engravuriĝis en la memoro de Vangjo kiel ankaŭ en tiu de la tuta komunumo. Dudek kvar viroj kaj tri virinoj troviĝis arigitaj sub la granda platano en la vilaĝa centro. La armitaj ĝendarmoj staris en plurlatera formacio ĉirkaŭ ili. Plejmulto da ili perpleksaj rigardis unuj la aliajn aŭ mallaŭtvoĉe diskutis inter si, dum kelkaj komencis petegi siajn gardistojn, ke ili lasu ilin foriri. Pli malantaŭe, tiuj virinoj, kiuj havis etajn infanojn apud si, staris mutaj kaj palaj, dum aliaj ploris, ĉar ili ne povis imagi, kiel ili trapasos la vintron sen la edzo hejme, sen enspezoj de laboro, sen rezervoj de tritiko kaj maizo, ĉar ja ĉiom laŭ ordono estis fordonenda por la bezonoj de la greka armeo. Kien ili prenus ilin? Por kiom da tempo? Ĉu ili eble mortigus ilin? Sed la plej malbona afero el ĉiuj: Kiel ili portus stigmon de perfiduloj kontraŭ la nacio, kiu pezus sur iliaj familioj dum tiuj ĉi ŝarĝitaj tagoj de milito? Ankaŭ la patro de Vangjo povintus esti inter la arestitoj, se li ne estus jam rekrutita kiel mulpelisto ekde la komenco de la milito, ĉar ankaŭ li mem estis rigardata suspekteme de la aŭtoritatoj, havante pli maljunan fraton, kiu studis kaj dum jaroj loĝis en Rumanio, kaj pro kiu li ankaŭ decidis sendi Vangjo-n, eĉ por nur mallonga tempo, al lernejo rumana.

Iom pli fore apude, flanke de la kafejo, sidis kelkaj vilaĝanoj, kiuj ne havis tiajn enplektiĝojn kaj scivoleneniĝojn rigardadis la tutan scenon. „Bone oni faras al ili! Ni saviĝu de ĉi tiu gangreno jam plurjara. Kiaj Rumanioj kaj kiaj kukurboj ... Kaj ne forgesu, ke plej multaj el ili posedas la pli bonajn kampojn. Oni sendu ilin al infero“, iu diris, kun la menso jam ĉefe travaganta tiujn ĵus menciitajn kampojn. Ili havis diversajn tiajn konversaciojn, eĉ kiam ili parolis pri propraj parencoj inter la arestitoj aŭ, ĉiuokaze, almenaŭ pri kunvilaĝanoj, kun kiuj ligis ilin komuna deveno kaj ĉefe fakte komuna sorto.

Ĉar tia estis la komunumo. Beno kaj malbeno samtempe. Beno pro la bela loko, pro ĉiuj homaj estaĵoj onin ĉirkaŭantaj, pro ĉio konstruita propramane, la domegoj, la pavimŝtonoj, la akvokranoj, la perakvaj segiloj, same kiel pro iliaj patronaj sanktuloj, ilia valorsistemo, iliaj simboloj kaj sanktaj lokoj. Unu tuta kulturo, kiu kunigis ilin ĉiujn kaj kiun je ĉiu disponebla okazo ili montris alekstere, tenante unuj la aliajn ĉe la manoj dum grandegaj cirklaĵoj dancoj, laŭ ritmoj de praa rito. Aliflanke, la malbeno de envio kaj divido, la konfliktoj inter diversaj egoismoj de unuopaj „ŝafoj de la grego“, kiuj rezultis ankaŭ en korespondaj batalkampoj. Ŝajnas, ke la komunumo do bezonis doloron, eĉ propran sangon, kiel aldonan kungluan substancon por la solidiĝo de sia unueco, por ĝia daŭra rebaptiĝo kaj renaskiĝo tra la paso de jarcentoj. Kaj se tiuepoke ne ekzistintus la „rumanemuloj“, tiam eble iu alia grupo estus elpensita por alpreni tian rolon, fakto, kiu pruviĝis malmultajn jarojn poste en la sangoverŝado de la Greka Enlanda Milito.

*(Daŭrigota en la sekva ·kune·.)*

# Bibliaj Tagoj en la Romia urbo Trier

de 2023-03-08 ĝis 2023-03-12  
(merkredo - dimanĉo)



Baziliko de Konstanteno

Foto: ©ttn GmbH

**Nia kunvenejo:**  
Romi-urba junulargastejo  
Famili-kaj Junular-gastejo  
An der Jugendherberge 4  
D-54292 Trier

Tel. 0049 651 14662-0

trier@diejugendherbergen.de  
www.jugendherberge-trier.de

Situo: ĉ. 1.800 m nordokcidente de la ĉefstacidomo, ĉe la rando de la urbokerno, proksime al la rivero Mosel

## Organizanto:

**Esperanto-Ligo por Kristanoj en Germanujo r.a.**

Prezidanto: Wolfram Rohloff, Am Marktplatz 82,  
D-09496 Martenberg-Zöblitz

## Partopren-kotizoj:

La prezo por tranoktado kaj 3 manĝoj tage en du-lita ĉambro (surteraj litoj) kun duŝo/necesejo, ekskursprogramo 250 € (post 2022-08-31 260 €, post 2021-10-31 270 €) por ĉiu persono. Rabatoj: Loĝantoj en eksterlando -65 €; en Germanujo loĝantaj KELL-membroj: -25 €. Krompago por unulita ĉambro (entute): +32 €.

## Programo

Diskutoj kaj prelegoj pri religiaj temoj, komunaj preĝado kaj kanto el "Adoru". Wolfram Rohloff preparas la kadran temon: "La leteroj de Petro" - Jauĉe ĝis sabate: Ulrich Matthias gvidos posttagmezan ekskursan programon en Trier kaj ĉirkaŭo. Aktualajn detalojn vidu en la Interreto: [www.esperanto.de/keli](http://www.esperanto.de/keli).

Muzika organizanto: Stefan Lepping

## Kondiĉoj de aliĝo

Via aliĝo validas post la alveno de via antaŭpago de 30 € por ĉiu persono kaj estos konfirmata post ricevo. La reston nepre pagu ĝis la **4a de januaro 2023**, ĉar la junulargastejo postulas ĝis tiam la pagon de la kotizoj. La antaŭpago estos repagata, se la aranĝo forfalas. Aliokaze vi povas ĉiam aliĝigi anstataŭtanton (samseksan). Kiu havas tro malmultan monon por povi pagi la partoprenkotizojn, turnu sin al la komisiito pri eksterordinara subvencio.

Ajnajn demandojn direktu al la

## komisiito por la Bibliaj Tagoj:

Rudolf Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, D-48356 Nordwalde  
☎ 0049 2573 / 626 und 0049 151 5133 6794  
✉ [fischru@uni-muenster.de](mailto:fischru@uni-muenster.de)

**Maksimuma nombro de partoprenantoj: 29**

Jen mi aliĝas definitive al la Bibliaj Tagoj de 2023-03-08 ĝis 2023-03-12 en Trier.

(titolo+) nomo: \_\_\_\_\_

strato/domnum.: \_\_\_\_\_

kodo, urbo: \_\_\_\_\_

telefono: \_\_\_\_\_

poŝtelefono: \_\_\_\_\_

repoŝta adr.: \_\_\_\_\_

Membro de KELL kun "Dia Regno"  jes  ne

vegetarano  laktozo  ceteraj limigoj

Mi jen mendas 2-litan ĉambron kune kun: \_\_\_\_\_

vegetarano  laktozo  ceteraj limigoj

La sumon de \_\_\_\_\_ € mi ĝiris je \_\_\_\_\_ (dato)

al la sekvanta konto:

Esperanto-Liga für Christen, Ev. Bank Kassel  
IBAN DE20 5206 0410 0006 4349 16  
BIC GENODEF1EK1

UEA-konto de Rudolf Fischer: rifs-w  
Rimarkigoj / proponoj: \_\_\_\_\_

**Bv. sendi la suprajn datumojn poŝte aŭ elektronike al:**

D-ro Rudolf Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a,  
D-48356 Nordwalde, Germanujo  
✉ [fischru@uni-muenster.de](mailto:fischru@uni-muenster.de)